

---

ESPERANTO

---



*La kastelo de Hamleto en Helsingør, apud Kopenhago.*

**N-ro 604 (3)**



**Marto 1956**

---

REVUO INTERNACIA

## Revuo Internacia

N-ro 604 (3)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto: H. HODLER

\* \* \*

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

\* \* \*

Ĉion por la redakcio oni sendu al la  
Redaktoro: W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrew-  
shire, Skotlando.

\* \* \*

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo  
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)  
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-  
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.  
Telefona: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

\* \* \*

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,  
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian  
represajon al nia redakcio.

Jara abono (1956): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj  
jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

\* \* \*

### Tarifo por reklamoj:

|          |           |           |          |
|----------|-----------|-----------|----------|
| 1 paĝo   | 128.— gld | 1/2 paĝo  | 64.— gld |
| 1/4 paĝo | 32.— gld  | 1/8 paĝo  | 16.— gld |
|          |           | 1/16 paĝo | 8.— gld  |

### Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por  
ĉiu duo da vortoj.

### Legantoj en 80 landoj

### Estrarar de U.E.A.:

E. Malmgren, prezidanto, Heleneborgsgatan 6,  
Stockholm, Svedujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77  
Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Bri-  
tujo.

D. Kennedy, vic-prezidanto, 21 Westfield Road,  
Bishop Auckland Co. Durham, Britujo.

P. M. Mabesoone, estrarano pri financoj, Pytha-  
gorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai  
Vauban, Perpignan (Pyrénées-Orientales),  
Francujo.

### Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,  
Britujo. Telefona: ARNold 90-81.

## ENHAVO

|  |    |                                       |    |
|--|----|---------------------------------------|----|
| La danĝeroj de sukcesoj .....                              | 33 | <i>Rubrikoj</i>                       |    |
| Du eventoj .....   | 34 |                                       |    |
| Vagado sub palmoj (8). <i>J. Ribillard.</i> ....           | 40 | Tra la mondo esperantista .....       | 35 |
| Instruu Esperanton al viaj infanoj. <i>I. Schleicher</i>   | 42 | CED .....                             | 39 |
| Agado esperantista en brita popollernejo. ....             | 44 | Esperantista vivo kaj nekrologo ..... | 49 |
| Intervjuo kun Paul Neergaard .....                         | 45 | 41a U.K. ....                         | 50 |
| La Tragedio de la Homo en la hungara nacia<br>teatro. .... | 46 | Belarta konkurso .....                | 50 |
| La jubilea eposo. <i>Rossetti.</i> ....                    | 47 | Oficiala Informilo .....              | 51 |
| Defendo de UEA. ....                                       | 48 | Radio .....                           | 55 |

# LA DANĜEROJ DE SUKCESOJ

Superflue ripeti la konsiderindajn atingojn de U.E.A. por Esperanto en la lastaj jaroj kaj precipe en la lastaj monatoj. Analizante siatempe la konatan Rezolucion de Unesko de la 10-a de Decembro 1954, mi akcentis, ke ĝi interalie signas komenciĝon de esence nova epoko: tiu de la iom-post-ioma oficiala rekono kaj akcepto de Esperanto. Mi ankaŭ diris, ke ĝi prezentas fortan armilon, kiu povos, se ĝi estos lerte utiligata, malfermi al Esperanto multajn pordojn kaj konduki ĝin laŭ novaj vojoj al rimarkindaj akiroj.

La respondecaj organoj de la Asocio daŭrigis de tiam ankoraŭ pli sisteme, laŭplane kaj organizite sian laboron kaj multrilate povis ĝin intensigi. La rezultoj ne mankis kaj certe ne mankos en la estonteco. Pri tio ĉiu ajn povis kaj povos konvinkiĝi.

Koncerne tion ĉio estas ĝenerale en bona ordo.

Kio estas malbona kaj eĉ tre danĝera por la plua disvastiĝo de la lingvo kaj por la interesoj de la Movado, estas la konvinko aŭ almenaŭ la agrabla kredo, kiu enradikiĝis en kelkaj esperantistaj medioj (ne sensignifaj laŭ la nombro), ke finiĝis la tempo de sindona batalado kaj ekestis la periodo de kolektado de fruktoj, sen ia speciala streĉo de fortoj, sen laboro, sen oferoj. En la malpli gravaj kazoj de tiu malsano oni kredas kaj kredigas la aliajn, ke U.E.A. sola povas atingi ĉion. Ĉe tio oni kutimas indentigi la Asocion kun ĝiaj nuraj gvidaj instancoj, aŭ kun kelkaj personoj aŭ eĉ kun unuopuloj. Kvazaŭ U.E.A. estus io alia ol la tuto de la partoj el kiuj ĝi konsistas: la landaj asocioj, la fakaj organizaĵoj, la membraro, la apogantoj! La sekvoj de tiuj konvinkoj, kredoj aŭ esperoj estis en pluraj lokoj vere fatalaj: troviĝis eĉ societoj — por doni nur unu ekzemplon — kiuj en tiu ĉi jaro ne nur ne malfermis novajn kursojn por komentantoj kaj progresintoj, sed eĉ tute malatentis la grupajn kunvenojn kaj kiun ajn lokan aktivecon.

Simila fenomeno estas rimarkebla ankaŭ rilate la sukcesojn, atingitajn tute interne de la Movado. Ni prenu kiel ekzemplon iun ajn planitan klopodon al iu celo: organizon de iu grava ekspozicio, aranĝon de iu internacia renkontiĝo aŭ eĉ de universala kongreso. Kio plej ofte okazas? Post kiam oni atingis la koncernen celon, subite la fortoj malstreĉiĝas, la interesiĝo malaperas kaj neniu plu faras ion ajn por kolekti la fruktojn de la atingita rezulto. Tiamaniere miloj da laborhoroj kaj granda kvanto da energio estas neracie perdataj kaj multaj gravaj atingoj restas sen iaj ajn pluj sekvoj.

Vole-nevole altrudiĝas komparo kun ĝardenisto, kiu per multe da ŝvito fine atingis bele ordigitan ĝardenon kun multaj fruktoarboj, sed kiu en la momento de la maturiĝo subite laca sidiĝas, ekfumas sian pipeton kaj duondorme trankvile rigardas la fruktojn falantajn teren kaj putriĝantajn iom post iom.

Estas necese diri tre klare kaj tre insiste: sindono kaj laboro estas necesaj ne nur en la preparaj stadioj de iu aktiveco, nek nur dum ĝia realigo, sed eble ankoraŭ pli post la atingita sukceso. En afero kiel la nia ĉiu sukceso devas esti konsiderata nur kiel rimedo por efektiva plua disvastigo de la lingvo per formado de novaj esperantistoj, fondado de novaj societoj, riĉigo de nia literaturo, paralela larĝigo de la kampo de diversaj praktikaj aplikoj kaj, aliflanke, kiel bazo por planado kaj realigado de novaj aktivecoj, kondukantaj al la fina celo: ĝenerala apliko de la Internacia Lingvo en ĉiuj internaciaj

## Alvoko al juristoj

De pluraj flankoj mi ricevis sugestojn, ke estus utile formi fakan organizaĵon de esperantistoj-juristoj aŭ alimaniere internacie kunligi la gekolegojn por povi pli efike utiligi Esperanton por fakaj kaj profesiaj celoj.

La subskribinto tre apogas la ideon kaj sekve petas ĉiujn esperantistojn, kiuj finis juran fakultaton aŭ samrangan altlernejon kaj kiuj profesie praktikas kiel profesoroj, docentoj, lektoroj, juĝistoj, prokuroroj, advokatoj, notarioj, solcitoroj aŭ en similaj branĉoj informi min je la adreso: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Anglujo, ĉu ili deziras, ke tia organizaĵo formiĝu kaj ĉu ili ĉeestos la kongreson en Kopenhago. Se estos sufiĉe da interesiĝantoj kaj se almenaŭ kelkaj el la interesiĝantoj estos en Kopenhago, mi estas preta organizi amikan fakan kunvenon de juristoj esperantistoj dum la sekvanta U.K.

Intertempe mi tre konsilas al ĉiuj kolegoj, kiuj estas individuaj (MA) membroj de U.E.A., fariĝi fakdelegitoj pri juraj aferoj.

Prof. D-ro Ivo Lapenna,  
Jura Konsultisto en Londono.

## ESPERANTO KAJ „JUNULA ĈAMBRO DE KOMERCO“

Esperantistoj kiuj loĝas en urboj kie ankaŭ estas „Junula Ĉambro de Komerco“ eble povos grave helpi la celon de nia movado, kaj vere partopreni en la sukceso de Esperanto.

Ĉi tiun jaron, la internacia konferenco de tiu organizaĵo okazos en Wellington, Nov-Zelando, kaj delegitoj venos el ĉiuj partoj de la mondo.

La Nov-Zelanda „ĉambro“ jam aprobis la ideon de Esperanto dum nacia konferenco, kaj estas eble ke diskuto pri internaciaj lingvoj troviĝos sur la internacia tagordo. Se tio okazos, ĉiu delegito DEVOS scii ion pri nia lingvo, kaj la devo por aranĝi tion estas en la manoj de ĉiuj Esperantistoj en ĉiu urbo kie sin trovas tiu organizaĵo.

La „Junula Ĉambro de Komerco“ estas vigla kaj agema grupo, kaj vere internacia organizaĵo, kaj ilia subteno estos vera gajno por la Esperanto movado. Se vi povas helpi, bonvolu tion fari tuj. Vizitu la reprezentantojn en via urbo, kaj certigu ke antaŭ ol la konferenco komenciĝos, ili sciu ĉion pri Esperanto kion vi povos doni al ili.

La afero estas urĝa kaj grava. Agu nun!

rilatoj. Nur tiel komprenata sukceso estas vera sukceso. Male, se la sukceso kontentigas nin per si mem; se ĝi erare kredigas nin, ke nun ni povas ripozi dormante sur iuj „laŭroj de gloro“, ĝi ĉesas esti sukceso kaj fariĝas danĝero por la estonteco.

La tasko de U.E.A. estas antaŭenigi Esperanton en la tuta mondo. Tiu de la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj, societoj, grupoj kaj unuopuloj estas progresigi kaj utiligi la lingvon en la koncernaj regionoj aŭ sferoj. La taskoj ne kontraŭas, sed kompletigas unu la alian. Tial sukceso en unu parto de la mondo aŭ atingita de unu organizaĵo, estas objektive sukceso de la tuta Esperanto-movado. Sed tia sukceso por havi veran valoron kaj konservi daŭran signifon devas kaj kuraĝigi la atingintojn al pluaj laboroj kaj inspiri la aliajn al similaj agoj.

La epoko de oficialigo de la Internacia Lingvo sendube komenciĝis. Tamen, estus granda eraro pensi, ke ĝi estos periodo mallonga aŭ ke la aferoj nun ruliĝos per si mem. Kontraŭe, ĝuste la nova situacio postulas novajn fortostreĉojn de ĉiuj. Ju pli proksimaj ni estos de la fina celo, des pli grandajn. Tion pripensu ĉiuj, kiuj inklinas kredi, ke estas eble kolekti la fruktojn sidante komforte en apogseĝo.

I. L.



## DU EVENTOJ

En la februara numero de „Esperanto“ ni komunikis du gravajn novaĵojn, kiuj povas havi tre gravajn sekvojn por la plua disvastigo de Esperanto.

El Parizo venis la informo, ke la 25-an de januaro la Komisiono por Kulturaj kaj Sciencaj demandoj de la Eŭropa Konsilantaro ĉiu-voĉe aprobis la proponon de 14 reprezentantoj en la Eŭropa Konsilantaro, laŭ kiu oni rekomendas al la Komitato de la Ministroj la eksperimentan instruadon de Esperanto en 5 lernejoj de Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando. Laŭ la propono, oni devus instrui la Internacian Lingvon al lernantoj inter 11 kaj 14 jaroj de la menciitaj 5 lernejoj. Post unujara lernado la lernantoj, laŭ la akceptita Rezolucio, devus kunveni en Strasbourg sub la aŭspicioj de la Eŭropa Konsilantaro, tiel ke la Kultura Komisiono povus fari raporton pri la atingitaj rezultoj. Tio, siavice, ebligus al la organoj de la Eŭropa Konsilantaro fari pliajn decidojn rilate la instruadon de Esperanto en la ŝtatoj-membroj de tiu organizaĵo. La Rezolucio akcentas, ke la lingvaj malfacilaĵoj prezentas obstaklon al la reciproka interkompreniĝo de la eŭ-

ropaj popoloj kaj al la evoluo de la eŭropa solidareco.

Estas necese diri, ke nun la tuta Asembleo de la Eŭropa Konsilantaro devos pritrakti la decidon de la Kulturkomisiono. Se la Asembleo akceptos la rekomendon, tiam ĝi devos esti submetita al decido de la Komitato de Ministroj. Nur post la akcepto fare de la Komitato de Ministroj, la propono povos esti fakte efektivigita.

Kiel oni vidas, la vojo en tiaj aferoj estas iom longa. UEA atente sekvas la evoluon kaj prezentas sian helpon kiam ajn ĝi estas bezonata. Ekzemple, ĉiuj membroj de la Kulturkomisiono ricevis ĝustatempe dokumento: eldonitan de CED, pri la nuna stato de Esperanto en la mondo. Okaze de la sekvanta Sesio de la Asembleo en Strasbourg, en la Eŭropo-Domo estos aranĝita granda Ekspozicio, kiu siatempe vekis tiom da interesiĝo en Montevideo.

La alia informo estas tiu, kiun ni ĉerpis el la granda kaj tre grava Brita gazeto „Sunday Times“. Temas pri la novaĵo, ke V. Molotov respondis per telegramo en la angla lingvo kaj en Esperanto al „Japana Popola Konsilantaro“, politika organizaĵo kiu propagandas la restarigon de diplomaciaj rilatoj kun Sovet-

Unio. La saman informon disaŭdigis la Japana Radio, la radiostacioj de Vieno, Budapeŝto k.a. Ĝin alportis ankaŭ multaj aliaj gazetoj. La novaĵo havas gravecon ĉefe tial, ĉar ĝi verŝajne indikas ŝanĝon de la oficiala starpunkto pri Esperanto en tiu lando. (Vidu pri tio la februaran numeron de „Esperanto“, jaro 1952, pp. 163-65.)

Se tiu informo estas ĝusta, tiam oni povas atendi en baldaŭa estonteco ne nur la restarigon de la Esperanto-Movado en diversaj landoj de Orienta Eŭropo, kie ĝi floris antaŭ la milito, sed ankaŭ konsiderindan disvastiĝon de la lingvo eĉ en Sovet-Unio kaj sur larĝaj teritorioj de Azio.

Aliflanke ekzistas danĝero, ke en kelkaj medioj de la Okcidenta mondo, ĉu pro neinformiteco ĉu pro principa malamikeco al Esperanto, oni komencu ligi la lingvon al difinita politika partio kun la celo kompromiti ĝian neŭtralecon kaj tiel malutili al ĝia plua disvastiĝo. En sia letero al la redaktoro de „Sunday Times“, aperinta en la n-ro de la 29-a de januaro, Prof. W. E. Collinson prave skribis: „Mi esperas ke la uzo de Esperanto fare de sinjoro Molotov en respondo al Japana Organizaĵo, kiel raportis Viator, ne supozigos, ke Esperanto havas politikajn ligojn kun ĝi.“

En la momento, kiam komencaĵas serioza interesiĝo pri Esperanto en politikaj organizaĵoj, kia estas la Eŭropa Konsilantaro, aŭ eĉ la oficiala uzo de la lingvo fare de registaroj, estas necese forte akcenti, ke nek UEA nek kiu ajn alia Esperanto-organizaĵo povas en kiu ajn senco influi la uzon de la lingvo fare de tiu aŭ alia interŝtata organizaĵo aŭ fare de tiu aŭ alia registaro por tiu aŭ alia celo. Ĝuste tial estas gravege plej rigore observi la fundamentan principon de neŭtraleco de UEA kaj de ĉiuj aliĝintaj landaj kaj fakaj asocioj en la interna agado kaj en la eksteraj aktivecoj. Hodiaŭ pli ol iam ĝis nun.

I. L.

# TRA LA MONDO ESPERANTISTA

## Brituo

Grupo de anoj de la angla *Bruderhof*-komunumo nun studas Esperanton dum komuna matenmango. La komunumo estas unu el naŭ en Eŭropo, Norda kaj Suda Ameriko, en kiuj 1,200 praktikas la frataran komunecon laŭ la ekzemplo de la unuaj kristanoj.

## Ĉeĥoslovakio

Artikoloj favoraj al Esperanto komencas aperadi sufiĉe ofte en la ĉeĥa gazetaro. Precipe *Literarni Noviny*, gravega gazeto kiu ĝis nun evitis mencion pri Esperanto, aperigis en sia 42a numero artikolon pri la esp-traduko de „Sinjoro Tadeo” kaj pri fonda de Esperanto-Asocio en Sovetunio. En ĝia 47a numero aperis informo pri ĉinlingva eldono de la ĉeĥlingva „Septembro kaj aliaj poemoj”, kies tradukon ebligis esperantaj tekstoj liveritaj al ĉina preparinto Jang Tin-ieh-ing.

★

Eminenta esperantisto en Praha danĝere malsaniĝis. Kuracistoj en hospitalo deklaris, ke povus lin helpi kuracilo fabrikata en Hungarujo, sed nehavebla en Ĉeĥoslovakio. S-ano Balkányi en Budapeŝt prizorgis tuj la kuracilon, kvankam mankis la necesa kuracista atesto, prizorgis ankaŭ la eksportpermeson kaj ekspedis la



Anoj de la 3a kurso ĉe la Somera Esperanto-Tendaro apud Chvalatice, Ĉeĥoslovakio, 1955, kiu daŭris ses semajnojn; partoprenis 146 kursanoj en 3 kursoj po 2 semajnoj; komencantoj, progresintoj, instruantoj. La tendaro estis tutŝtata, kaj organizita de la Esperanto rondo ĉe la Domo de Klerigo en Trebic.

20 injekciojn eksprese al Praha la saman tagon, en kiu li ricevis la peton. Dank' al nia lingvo, li eble savis valoran homan vivon.

★

En sukerfabriko en Kromeriz estas granda telefona centrejo, kiu ne volis funkcii. Lokaj fakuloj ne povis ĝin ripari. S-ano Stanislav Čáp legis sur la centrejo la ŝildon de la sveda „Ericsson”, kiu ĝin konstruis, kaj li skribis tuj al sveda fakulo s-ano Sten Øfers en Johanneshov, kies adreson li trovis en UEA-jarlibro. Øfers prizorgis de „Ericsson” detalan priskribon de la centrejo kun kompleta skemaro, laŭ kiu la elektristoj en Kromeriz rapide kaj facile ekfunkciigis la maŝinon.

## Francuo

Pro la agado de la esperantistoj, kiuj skribis amase al la franca radio, komence de la elsendo „Bonsoir l'Europe; ici Paris”, inter la 21 diverslingvaj salutoj, troviĝas nun ankaŭ en Esperanto la frazo: *Bonan vesperon, Eŭropo; tie ĉi Parizo!* kaj ĉe la fino aŭdiĝas ankaŭ: *Bonan nokton, Eŭropo!*

## Aŭstrujo

D-ro Hideo Sinoda, ĉefkuracisto kaj vicdirektoro de kvin malsanulejoj en Jamagata, Japanujo, vizitis Aŭstrujon de la 28a de novembro ĝis la 9a de decembro, kaj interalie prelegis al kuracistoj pri sia metodo operacii utero-karcinomon en jam tre progresinta stadio. En ĉiuj siaj prelegoj D-ro Sinoda kompreneble parolis nur Esperanton, kaj lokaj esperantistoj Steiner kaj Sirk tradukis. Lia vizito estis vaste raportita en la ĵurnaloj, kaj faris bonegan impreson.

★

La Esperanto-Societo „Unueco” en Graz invitas ĉiujn samideanojn al „Intersocieta Renkontiĝo” dum la tagoj 19a ĝis 21a de majo 1956. Riĉa programo, nenia kotizo! Informpetojn al la adreso: Anton Podrepschek, GRAZ, Sackstrasse 16/I, Aŭstrujo.



D-ro Sinoda kun familio Steiner kaj Urbkonsilisto Zangerl, ĉe la Zamenhofmonumento en Wörgl. (vd. sub Aŭstrujo)

★

Studenta Esperanto-Grupo „Jules Verne” en Lyon organizas 3-tagan Internacian Konferencon de Esperantistaj Studentoj ekde la 22a de junio 1956. Partoprenontoj en la 41a UK povos ĝustatempe atingi Kopenhagon. La konferenco traktos ĉefe la problemojn de studenta Esperantomovado, kaj estos kultura manifestacio de esperantistaj studentoj. La restadkosto estas por studentoj ĉ. 300 fr. tage, por manĝo kaj dormo. Interesatoj skribu al: Studenta Esperanto-Grupo „Jules Verne”, 7 rue Major Martin, LYON, Francujo.

★

En „L'Abeille de France” n-ro 363 aperis artikolo „Une ruche archéologique”, tradukita el Esperanto de s-ano Gaston Vidal.

### Germanujo

Laŭ la decido de la lastjara kunveno de TEJO en L'Aquila la nunjara kunveno de TEJO okazos de la 28 julio—4 aŭgusto en la Nordmara Banloko Büsum, kiu situas kvazaŭ sur la vojo al la kongresurbo Kopenhago. La lokaj kaj la distriktaj instancoj ebligos per eksterordinare grandaj subvencioj altnivelan aranĝon de la kunveno kaj ebligos krome agrablan loĝadon de la partoprenontoj en la grandaj komfortaj internulejoj de la gimnazio de Büsum. La partoprenontoj estos honorgastoj de la Banloka Administracio kaj per tio havos la eblon ĝui la ĝojojn de la somera ĉemara restado. La kostoj de la tutsemajna restado inkluzive tuttagan ekskurson ne transpasos 50.—germanajn markojn. Esperantistaj gejunuloj kaj amikoj de nia kunveno, petu bildriĉan prospekton kun Esperantoteksto kiu enhavas la provizoran programon kaj aliĝilon de 12-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO, Nordseebad Büsum, Friedrichstr. 16, Germanujo.

★

Aperis turisma prospekto *Wiedenbrück en Vestfalia* kun esperanta aldono. Petu de Städt. Ver-

kehrsam, Marktplatz aŭ de AEROP-Reiseburö, Mönchstrasse 18.

★

Por helpi al siaj membroj kaj al junaj komencantoj en Germanujo ricevi amikojn en la tuta mondo, Germana Esperanto-Junularo (GEJ) fondis Korespondan Servon, kiu kolektas adresojn de junaj (ĝis 25-jaraj) eksterlandaj samideanoj kaj disdonas ilin al samaĝaj germanaj korespondontoj. GEJ petas ĉiujn junajn esperantistojn tutmondajn, kiuj deziras korespondi kun germanaj amikoj, skribi al la Korespondanta Servo (adreso: S-ro Hans Best, Untere Mühlaustrasse 218, Mannheim, Germanujo) indikante siajn nomon, antaŭnomon, adreson, sekson, aĝon, profesion, lingvoscion esperantistan (komencanto aŭ progresinto) kaj interesojn, krome sekson, aĝon kaj profesion de la dezirata germana korespondonto.

### Grekujo

En „Aneksartisia” de la 18a kaj 25a de decembro aperis la novelo „La Junulino, la Ĉapelo kaj Mi” (Esperanto, Nov. 1955) en greklingva traduko de s-ano Ioanis P. Kaloumenos.

### Havajo

La du esperantistoj en Honolulo, s-ro Bunnie J. Chambers kaj Frato Charles C. Cunningsmith,

S.M., sukcesis aranĝi malgrandan ekspozicion en la enirhalo de la urba biblioteko, de la 28a de novembro ĝis la 19a de decembro. Tri tabuloj montris ekzemplerojn de privata korespondo, komercaj kaj turismaj reklamoj, gazetoj, kaj la organizon de UEA. Du montrorankoj montris diversajn librojn: literaturo, antologioj, poezio, lernolibroj, libroj por blinduloj, k.t.p. Dum la unua semajno de la ekspozicio aperis en la matena kaj vespera ĵurnaloj artikoletoj pri Esperanto kaj la ekspozicio, kaj unu radioelsendo, ĉiuj faritaj de s-ino Kathleen Kerr, ĉefo de publikaj rilatoj de la biblioteko.

### Hispanujo

Nacia Hispana Kongreso okazos en Barcelono la 25-an de Julio 1956.

★

Post informa publika parolado de S-ro Dalmau antaŭ pli ol cent ĉeestantoj, interesiĝis dudek aŭskultintoj por lernado de Esperanto, kaj estiĝis en Vilafranka (Barcelona) Esperanto-Grupo gvidota de Sroj. Sans, Nin kaj Sogas.

### Hungarujo

La Hungarlanda Konsulta Komitato preparolis dum sia dua kunveno la 13-an de novembro en Budapeŝt gravajn problemojn. Oni



Generala aspekto de la malgranda ekspozicio starigita en la ĉefhalo de la urba biblioteko de Honolulo, Havajo.



*Kelkaj samideanoj el la Caratinga Esperanto-Grupo (Brazilo) piknikas.*

ĝoje akceptis la inviton de la Asocio de Esperantistoj en Pollando por fari konferencon de delegitoj de la orienteŭropaj kaj aziaj popoldemokratiaj landoj en Varsovio. Samtempe oni decidis proponi, ke en Ĉeĥoslovakio okazu venontjare la II-a Danubvala Esperanto-Konferenco. Laŭ la raportoj en Hungarlando funkcias jam 5 esperanto-rondoj kaj tri novaj estas projektataj. En gimnazio de urbo Vasvár prof. dro J. Kondor organizos en kadro de la junulara societa laboro esperanto-rondon, al kiu la Instrua Ministerio donis permeson. La hungara Instituto por Kulturrilatoj rekonis la agadon de la Komitato kaj estas espero, ke oni ebligos la partoprenon de delegitoj ĉe eksterlandaj esperanto-aranĝoj, se venos konvena invito. Tri provincaj instruistoj havas kurson por glernantoj. La „Paco” esperanto Rondo aranĝis en kadro de la ekspozicio de la Kulturhejmo en Hódmezővásárhely, kiel ties oficiala fakgrupo, esperanto-ekspozicion sub la devizo „Per Esperanto por la Paco!”, montrante sur terglobo, kunligata kun fadenoj kaj naciokoloraj rubandoj la rektajn kontaktojn de la hódmezővásárhelya rondo kun la diversaj landoj, ilustrante per karakterizaj bildoj la opajn landojn/ekz. Nederlando: tulipkampoj, Finnlando: Olimpiado/. Pro la sukceso ankaŭ tie komenciĝis kurso. Pri la fakrondo regule aperigas sciigojn hungarkaj esperantlingve la monata revuo de la hódmezővásárhelya kulturdomo. Uzina gazeto de buda-

pesta teksaĵfabriko aperigis sciigon pri fondo de junulara esp. rondo. Laborista ĵurnalo de la fabrikoj de distrikto Csepel aperigis artikoleon pri la budapesta „Paco” Esp. Rondo kaj pri Mondpaca Esp. Movado. En la lastnomita rondo regule kunvenas semajne 40-50 personoj. Inter la aranĝoj menciinda estas lumbildparolado pri la vivo de la eskimoj kaj memorkunveno je dekjara fondiĝo de la Federacio de la Demokrata Mondjunularo, kiu promesis oficiale utiligi Esperanton. Oni ĝoje akceptus lumbildseriojn por montri diversloke. Jam dum unu jaro la provincaj esperantistoj ricevas ĉiumonate maŝinskribitan sciig-folion pri la kultur-kaj pacnovaĵoj el la movado. Ili tiujn, ofte eĉ kopiante, pluendonas kaj pluensendas kaj tio anstataŭigis bultenon. Nun la Landa Komitato esperas aperigi cirkuleron aŭ bultenon hungarlingvan, sed ankoraŭ necesas fortostreĉo kaj monhelpo de la tutlanda esperantistaro.

### *Italujo*

Okaze de manifestacioj pro la duonjarcenta festo de sia grupo, la milanaj esperantistoj metis sub la marmora ŝildo de la strato Zamenhof laŭran kronon je memoro de la iniciatinto de Esperanto.

★

„Paradizaj ferioj en Granda Paradizo” estas la slogano de la feria aranĝo, kiun Itala Esperanto Federacio organizos venontan someron. La restadejo gastigos, dum tri semajnaj vicoj, esperan-

tistojn de ĉiuj landoj en unu el la plej sorĉaj valoj de italaj Alpoj (1500 metrojn). La manifestacio estis oficiale enkadrita en la kalendaro por 1956 de la Provinca Turisma Entrepreno de Torino. Oni jam eldonis elegantan prospekton („Invito al Granda Paradizo”) haveblan ĉe: F.E.I. Turismoficejo, Via S. Antonio da Padova 4, TORINO.

★

Por la 58a Internacia Foiro de Verona, okazonta de la 11a ĝis 19a de marto 1956, oni eldonis propagandan poŝtkarton. Adreso: Foiro de Verona Esperanto Sekcio, Poŝt Kesto 199, VERONA.

### *Japanujo*

Dum oktobro 1955 s-ino D. M. Worcester vizitis la urbojn Kobe kaj Osaka, kaj faris multajn prelegojn en kooperativaj rondoj, tradukitajn de la lokaj esperantistoj kaj raportitajn en la gazetaro.

### *Kanado*

De junio ĝis novembro 1955 estonaj esperanto-propagandistoj ges-roj Loorits loĝis kaj vojaĝis




en Kanado. Dum julio en loka Radio Stacio de Port Alberni s-ro Loorits faris paroladon pri Esperanto. Ili travojaĝis, krom Port Alberni, tra Nanaimo, Vancouver, Toronto kaj Montreal, prelegante en kaj pri Esperanto. Aperis en la gazetoj, multaj artikoloj kaj fotoj pri ili. En novembro ili forvojaĝis el Quebec al Germanujo, kaj ankaŭ surŝipe prelegis kaj gvidis kurson.

## Kanariaj Inuloj

La 6an de decembro komenciĝis en la Universitato de La Laguna oficiala Esperanto-kurso, kiun partoprenas 59 personoj, inkluzive plurajn universitatajn profesorojn, kanonikon, gestudentojn kaj gelaboristojn. Pro tiu ĉi evento en la insula vivo la gazeto *El Día* dediĉis grandan spacon al intervjuo kun la konata esperantisto kaj eldonisto Juan Régulo Perez.

## Nederlando

Esperantista vizito el araba lingvo-teritorio al eŭropa lando ĉiam renkontas simpation kaj interesigon ne nur inter esperantistoj sed ankaŭ ekster iliaj vicoj. Pri tio atestas la studvojaĝo de



S-ro A. Hasebroek, estro de la kurso por hotel- kaj restoraci-kuiristoj; C. I. Keur, UEA-delegito; Ing. M. Joussef; G. H. Koudijs, sub-direktoro de la Tehnika Lernejo en Utrecht.

Ing. Mohamet Joussef de Aleksandrio al Nederlando, pri kiu la tieaj gazetoj raportis.

Interalie Ing. Joussef interkonatiĝis kun la Tehnika Lernejo en Utrecht (Utreĥto) en la centro de la lando, unu el la plej grandaj institutoj en sia speco (2200 kursanoj) por pristudi la organizan sistemon kaj la instrumentadojn. S-ro G. H. Koudijs, subdirektoro de la lernejo, prezidanto de la Utreĥta Esperantista Rondo, bonvenigis la gaston, kiu estis enkondukata de s-ro C. J. Keur, UEA-fakdelegito, de la nederlanda ministerio por socialaj aferoj kaj publika sano.

## Sovetunio

Post pli ol 20-jara stagnado revekigis la Esperanto-movado en Armena Respubliko. Konataj armenaj esperantistoj Prof. D-ro Gurgeno Sevak kaj Simon Mkrtiĉjan iom post iom restarigas kontaktojn kun Esperantujo. S-ro Teo Jung kompleze alsendas la n-rojn de Heroldo, estas ricevataj la „Paco“ kaj „Pacdefendanto“ el Ĉeĥoslovakio, Hungarujo, Pollando kaj Bulgarujo. Erevan — la ĉefurbo de Soveta Armenio — estas, post Moskvo, la dua urbo en Sovetunio, kie aktive agas la samideanoj. Jam estas organizita Esperanto-rondeto en Erevana Ŝtata Universitato; la kurson partoprenas 24 sciencaj laboruloj de la filologia fakultato — profesoroj, docentoj kaj lektoroj de la katedroj de armena, rusa, orientaj kaj okcidentaj lingvoj. La solena malfermo okazis la 14an de decembro 1955. Post bonveniga salutarolado kaj montrado de freŝaj esperantaĵoj, Prof. Sevak komencis la unuan lecionon. La pluaĵaj lecionoj okazas dufoje en semajno po du akademias horoj. Baldaŭ komenciĝos lecionoj ankaŭ por grupo da studentoj de Erevana Pedagogia Instituto sub gvidado de pedagogo S. Mkrtiĉjan.

Estas petataj sugestoj flanke de Esperantujo per salutleteroj kaj diversaj eldonaĵoj en Esperanto. Ĉion oni adresu al Prof. Gurgeno Sevak, Poŝtkesto 78, EREVAN, Armenio, USSR.

## Svedujo

Sveda Esperanto-Instituto decidis denove aranĝi, antaŭ la Kongreso en Kopenhago, la kultursemajnon „Sveda Somera Semajno“ en Frostavallen, la idilia loko, dum la semajno 29 julio—4 aŭgusto 1956. La ĉefa temo de la prelegoj estos *La ĉefaj obstakloj al internacia kompreniĝo kaj kooperado*, kaj en tiu kadro okazos serioj po 3 prelegoj de: Docento S. Pragano pri „Instruado de historio en diversaj landoj“; D-ro C. Stöp-Bowitz pri „Rasoj

kaj rasaj antaŭjuĝoj“; Prof. G. Waringhien pri „Lingvaj obstakloj“; kaj Prof. D-ro I. Lapenna pri „La laboro de UNESKO por forigo de la obstaklo al internacia kompreniĝo kaj kooperado“. Krom tio okazos diskutoj en la posttagmezoj pri la tre gravaj partoj de nia E-laboro: Informado, Instruado, Organizaj demandoj kaj Kulturaj problemoj. En la vespero estos distraĵoj, ktp. Entute ĉio formos tre enhavoriĉan kaj altkvalitan semajnon, kiu estos tre valora por la esperantistoj, la movado kaj ĝia laboro. Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi ĉe S-ro Jan Ströme, Amiralsgatan 36, MALMÖ, Svedujo. Frostavallen havas tre bonan hotelon, donas abundan kaj bongustan manĝaĵon kaj ĉiumaniere servas al la gastoj. Ekzistas nur 80 litoj, kaj vi devas anonci vin kiel eble plej baldaŭ.

★

La sveda propagandistino Anna Alamo-Sandgren por la unua fojo permesis al la prelegista asocio kandidatiĝi ŝin en la prelegaj societoj (popularsciencaj, proks. egalaj al popolaj universitatoj en aliaj landoj). Ŝia propra distrikto, gubernio de Örebro, ŝin rezervis por si dum la printempo. Dank' al sia konateco en aliaj sferoj ŝi atingis jam dekomence bonegan pozicion: el 69 prelegistoj nur unu (cetere ne prelegisto sed bardo) ricevis pli da vokoj ol ŝi!

Siaj temoj estas „Kie la mondirektoj renkontiĝas“ kaj „Sub greka suno kaj turka luno“, ambaŭ pri ŝia pasintjara vojaĝo al Jugoslavio, Grekujo kaj Turkujo. Por la aŭtuna sezono ŝi preparas i.a. „Homoj ĉirkaŭ la podio“, pri la spertoj kiel internacia paroladistino. Flanke de la prelegaj societoj ŝi kiel antaŭe frekventas superajn edukejojn, religiajn mediojn kaj E-klubojn, parte kun aliaj temoj

S-ino Sandgren, kiun en 1947 komune dungis Sveda Esperanto-Federacio kaj Sveda KELI-sekcio, faris ĝis nun c. 1700 prelegojn en sia servo al nia movado, 219 dum la pasinta jaro.



Lastatempe alvenis vokadoj al prelegaj serioj i.a. en Finnlando, Serbujo kaj Usono, sed ŝi ne scias, ĉu eblos ilin akcepti dum la nuna jaro.

\*

Tuj antaŭ la UK en Kopenhago okazos KELI-kongreso en Jönköping, Svedujo. Kongresejo estos la kristana popola altlernejo, kosto por tutsemajna restado kaj ekskursoj ĉ. 110 sv. kr. Adreso por informoj kaj aliĝoj: KELI, Storgatan 7, Örebro, Svedujo.

#### *Svisujo*

En majo 1956 en Genevo, Svislando, okazos tutmonda ĵurnalista renkontiĝo. En ĝia tagordo staros interalie demandoj pri objektiva informado, pri kreo de kontakto per kunlaborado kaj reciproka vizitado de ĵurnalistoj diverslandaj, pri interŝanĝo de profesia sperto. La renkontiĝo estas organizota de neniuj organizaĵoj kaj apartenos al neniuj grupo. Tie

oni povos starigi ĉiun alian demandon, oni povas diskuti pri ĉiu temo. Ni tie kunvenos por libere kaj sincere interparoli. La renkontiĝon partoprenos ĵurnalistoj de diversaj konvinkoj kaj tendencoj. La devizo estos: Malpliigo de la internacia politika tensio, lukto por konservi la pacon. Estas tre dezirinde, ke multaj esperantistoj-ĵurnalistoj partoprenu tiun ĉi renkontiĝon. Ni povus okazigi fak-kunsidojn, preparoli nian estontan agadon. Vian opinion kaj vian deziron partopreni sciigu kiel eble plej frue al: *Assen Grigorov*, bulv. Tolbuhin 10, Sofia, Bulgario.

#### *Usono*

La 10an de decembro okazis granda bankedo en Los Angeles por festi la naskiĝtagan datrevenon de Zamenhof. La plej interesa parto de la vespero estis, ke f-ino Hedwiga Reicher deklamis partojn el *Ifigenio en Taŭrido*. Ŝi neniam lernis Esperanton,

sed dum la 4a UK en Dresden, 1908, ŝi kaj la patro estis anoj de la dresdena Opero, kiu prezentis Ifigenion tute en Esperanto. Ŝi bonege rememoris kelkajn partojn, kiujn ŝi en perfekta Esperanto deklamis. Inter la aŭdantaro troviĝis s-ino Paula Parrish, edzino de la ĉefdelegito de UEA por Usono, kiu ĉeestis la kongreson en Dresden!

La 17an de decembro estis en San Diego Zamenhofa bankedo. Samtempe la E-societo en San Diego festis sian unujaran ekzistadon.

La urbo Escondido (7000 loĝantoj), 30 mejlojn for de San Diego, nun ja scias pri Esperanto. En *Daily Times-Advocate* aperis duonpaĝa artikolo de nia s-anino Marion H. Sharp.

En *Advertising Age* aperis tre longa kaj tre grava artikolo pri la malfaciloj de tradukado de reklamoj, verkita de Alfonso Lomo, kiu tre rekomendas Esperanton.

# CED

Centro de Esploro  
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.  
Telefono: ARNold 90-81

## LA UNIVERSALA EKSPOZICIO DE ESPERANTO EN STRASBOURG

La granda ekspozicio, kiu sub la nomo „Unua Universala Ekspozicio de Esperanto” estis aranĝita en Montevideo fine de la j. 1954, estas nun transportata al Eŭropo. Okaze de la sekvanta Sesio de la Asembleo de la Eŭropa Konsilantaro ĝi estos prezentita dum ok tagoj en la salonoj de la Eŭropa Domo mem en Strasbourg. Tiucele la Sekretariato de la Eŭropa Konsilantaro afable disponigis senpage la belegajn ejojn.

La celo de la aranĝo estas montri al la Representantoj de la Eŭropaj ŝtatoj ĉion, kio estas atingita en Esperanto kaj pere de ĝi. Tio sendube faciligos al ili ricevi objektivan bildon pri la valoroj, kiujn prezentas la Internacia Lingvo. Ĝi estas des pli grava, ĉar la Asembleo decidis dum tiu Sesio pri la rekomendo de 14 reprezentantoj enkonduki Esperanton eksperimente en kelkajn lernejojn de Eŭropaj ŝtatoj. La menciita rekomendo estis unuanime aprobita de la Komisiono pri Kulturaj kaj Sciencaj demandoj la 25-an de Januaro en Parizo.

En Strasbourg jam estas formita speciala Ekspozicia Komitato sub la prezidanteco de s-ro Hubert Ferez. Ĝia tasko estos akcepti la tutan ekspozicion el Montevideo, kolekti novajn materialojn, aranĝi la ekspozicion mem kaj prizorgi la deĵoradon. Estos necese ankaŭ fari novajn, aktualajn grafikajn kajojn en la angla, franca kaj Esperanta lingvoj. Siavice C.E.D. direktas la tutan laboron. Ĝi jam ellaboris detalan ekspozician planon surbaze de la spertoj el Montevideo kaj liveris freŝdatajn statistikajn tabelojn, surbaze de kiuj estos faritaj la grandaj desegnaĵoj kaj grafikajoj.

### Urĝa peto

Por ke la ekspozicio estu kiel eble plej kompleta, C.E.D. petas ĉiujn eldonistojn, administrantojn de gazetoj, eldonintojn de flugfolioj kaj de aliaj publikaĵoj en Esperanto aŭ en la naciaj lingvoj pri Esperanto sendi tuj — la ekspozicio komenciĝos meze de Aprilo — al adreso: *S-ro Hubert Ferez, Conseil de l'Europe, Esperanto-Exposition, Strasbourg, France*, ĉiujn Esperantajn librojn, gazetojn, bultenojn, informilojn kaj similajn publikaĵojn; ĉiujn nacilingvaj gramatikojn, lernolibrojn, vortarojn; ĉiujn nacilingvaj tradukojn de Esperantaj verkoj; plue prospektojn, reklamojn, flugfoliojn k.s., mallonge ĉion, kio aperis en Esperanto aŭ pri ĝi post Septembro 1954. Por la ekspozicio en Montevideo CED faris plurajn alvokojn kaj dissendis multajn cirkulerojn; nur tiam komencis fakte abunde alflui la necesa materialo.

Nun tio ne estas ebla, ĉar mankas la tempo. Do, agu tuj kaj senprokraste sendu la petitan materialon al la indikita adreso.

Por kovri la plej necesajn elspezojn de transporto la Estraro de UEA disponigis por aranĝo de la ekspozicio en Strasbourg la sumon de 100.000 francaj frankoj. La antaŭviditaj elspezoj por tiel granda aranĝo, kiu ĉiurilate devas esti sur tre alta nivelo, estas konsiderinde pli altaj. *Sekve CED apelacias al pli bonhavaj esperantistoj kontribui finance al la konstanta Fondaĵo Ekspozicio.* La donacojn oni sendu aŭ rekte al la Administrativa Oficejo de UEA en Rotterdam, aŭ al la ĉefdelegitoj, en ambaŭ kazoj kun la klara indiko: „Por la Fondaĵo Ekspozicio”.

CED deziras ankoraŭ informi, ke nun ĝi esploras la eblecon organizi en kunlaboro kun la Internacia Federacio Esperantista Fervojista „vojaĝantan ekspozicion”, kiu veturus, tuj post Strasbourg, tra pluraj Eŭropaj landoj en speciala ekspozicia vagono por atingi Kopenhagon dum la Universala Kongreso.

Laŭ la statistiko, kiun faris la kunlaboranto de CED por radio-aferoj, s-ro G. Larglantier, en 1955 okazis entute 1.170 Esperantaj radioelsendoj de 20 stacioj el 11 landoj. La Esperantaj elsendoj daŭris entute 266 horoj kaj 30 min. Kursojn pri Esperanto disaŭdigis Paris, Perpignan, Rio de Janeiro, La Coruña, Ljubljana. Esperantlingvajn programojn elsendis Bern, Hilversum K.R.O., Hilversum V.A.R.A., Wien I, Wien II, Valencia, Zagreb, Caramulo, Guatemala, Montevideo, Carlet, Bilbao, Roma, Nacilingvajn programojn pri Esperanto kun partoj en Esperanto disaŭdigis en la pasinta jaro tre multaj stacioj de diversaj landoj, sed tiuj elsendoj ne estas enkalkulitaj en la statistiko.

En 1952 okazis entute 741 Esperanto-programoj, en 1953 ilia nombro estis 845, en 1954 la cifero altiĝis al 1.014, dum en 1955 ĝi estis 1.170. Do, konstanta kresko de jaro al jaro.

J. Ribillard

# Vagado sub palmoj (8)

Reggan

## Trakampara Ekskurso

Estas bone tion diri al ĉiuj eŭropaj kuracistoj: trasomero en Saharo estas la plej efika terapio kontraŭ grasdikeco. Kiu hejme bareliĝas pro troamo al la kulinara scienco, tiu ĉi-tie troviĝos elegante beltalia post trimonata restado, sen medikamento, sen aparato. Tion vi facile komprenos, kiam vi scios, ke trinkinte nur unu glason da biero, vi tuj perŝvitos du. Tiun kuriozan fenomenon mi ofte spertis, kaj kreu min, dank' al ĝi mi svelte siluetiĝis dum nombraj jaroj. Do, se iu altruisma leganto disponas sufiĉan kapitalon por starigi dehidrad-sanatorion apud Adrar, li utilos al multaj sibaritoj suferantaj pro ventro ovoforma aŭ adipozaj sidvangoj, kaj ĉerpos gravan profiton el tiu bonokaza institucio. Cetere li ne bezonos surloken transloĝiĝi por ĝin direkti, mi mem certigos prosperan funkciadon pro severa, tamen plezuriga eksperimento.

De Timudi al Adrar la vojaĉo torde rampas inter malaltaj montetoj, kies nigra ŝtonkrusto vidiĝas sablajn makulojn, kvazaŭ favaj kranioj de Senegalanoj. La senkovraĵa aŭtomobilo limakumas sur tiu irejo tiel glata kiel ondlado, plorĝemante per siaj torturataj risortoj. Ĝia tusanta motoro, vera bolpoto, ellasas vaporan nubeton tuj sorbatan de l'arda aero. Ĉe ĉiu vojturno, dispeciĝas la naŭza pejzaĝo. Plenĝoje ridas la suno, kaj vertikale

marteladas mian doloran verton, kiu tamtame vibras. La kondukisto, holanda legiano, rapide rostiĝas kaj bele brikkoloriĝas, dum mi antaŭsentas, ke mi ne tro suferus, se hazarde mi devus trazezoni en la Danta infero. Tiu penso agrable konsolas min. Ni nin testude trenas funde de la hejtitaj valetoj, kie kompatindaj gumarboj ne povas ŝirmi eĉ sian piedon sub la ombro de sia dorna kaj kripla branĉaro.

Ni fine eliras el la kaldronego, kaj la montetoj malaperas, cedante la lokon al senviva ebenaĵo rande garnita de sablodunoj. Sur la blindiga vojo ni traboras la mortan silenton de tiu malplena vastego, kie nenia prudenta besto konsentus ekstere promeni. Nur dromedaroj, homoj kaj azenoj iafoje sin riskas pro escepta bezono aŭ denaska frenezeto. Ni tange veturas pli rapide sur la revarmiĝanta tero, postkurataj de ora polvonubo, kiu dense altiĝas en la senmova aero. Mia brulanta kepo ŝajnas tro mallarĝa, kaj martire premas mian dilatatan kranion, en kiu tamburas ebria gurdisto. Sed antaŭ miaj vitrecaj okuloj la dezerto ekvomas bukedon da longkreskaj palmoj. Ĉe la eniro gajemaj negridoj, tute senvestaj, klarionas: — .....Sbah... Dekminuta halto... Bufedo...

Ni paŭzas sub diafana foliaĵo, kaj rapidigas lun-

ĉon el niaj konservaĵoj kaj daktiloj freŝaj kun ŝaŭma selakto. Disjetinte kelkajn monerojn al la petolemaj knaboj, ni ekiras kaj denove penetras en la fornegon.

Mi spiras flamojn, kiuj rapide konsumas la ĵus-sorbitan selakton kaj plie miajn intimajn fluidaĵojn. Sen tiuj internaj provizoj mi min sentas grade mineraliĝi, kaj sopiras al la egoismaj Finnoj, kiuj ĵaluze kaŝgardas 4.000 trinkeblajn lagojn en siaj arbaroj. Jen Adrar aperas ĉe la apokalipsa horizonto, kiel la promesita lando sub la okuloj de Moseo. La ŝoforo, kies sensaliva lango elŝoviĝas el lia malfermita buŝo, same kiel helanta gazelhundo post seshora ĉaso, sovaĝe platiĝas la akcelilon, kiu dolore spronas la motoron. La veturilo spasme ekgalopas, diskraĉante akvoŝprucojn tra sia ruĝa radiatoro. Mi suprensaltas kaj refalas funden de la sidilo, al kiu mi firme krampas min. Ni nun rajdas furiozan ĉevalon, kiu senbride impetus sur la Epsomdromo. Kun tondra bruoj ni rakete pafiĝas tra altogiva pordego, torentas sur nuda placego, kie post lasta singulto abrupte nin else-



ligas nia elĉerpita sed venkinta kurbesto. Ni estas en Adrar.

La placego estas malplena, silenta kaj blanka. La suno kolere varmegigas la urbeton, kies saĝaj loĝantoj siestas la tutan posttagmezon. Ilin ne vekis nia triumfa petardado. Longa arkadaro lacece sin apogas al la lutitaj domoj. En la ombro senorde kuŝas fuŝformaj sakoj. Interne oni trovas arabojn. Ili dormas. Cetere ĉiu dormas, ŝirmite kontraŭ la mortigaj radioj: viroj sub sia burnuso, kies kapuĉo kovras la vizaĝon; ĉi tiu feluzita azeno sub siaj pendantaj oreloj; tiu dromedaro, akordione faldita sub sia molaĉa ĝibo; eĉ la gluecaj muŝoj sur la tindra trufo de letargia hundo. Tra la fandiĝanta placo, sufokate de la flagranta drakospiro, mi pene min tiras al la Transatlantik-Hotelo, stumble eniras, kadavre falas en kanplektitan brakseĝon, kaj sukcesas prononci nur unu vorton:

— .....Bieron...

Kun orienta apatio, flegma kelnero mistere mo-

viĝas en la mallumo kaj solene alportas dolĉecan trinkaĵon, kiu tuj malaperas en mian sponĝan gorĝon. La malvigla sklavo estas apenaŭ foririnta, jam raŭka krio lin ekskuas:

— .....Bieron...

Sep fojojn li senhalte iras kaj reen, sep fojojn mi forglutas botelon da tiu sengusta likvaĵo, kiu sep fojojn min savas de la morto. Mirakle irigaciite mi flore reviviĝas, dum la miranta kaj respektema servisto forfandiĝas en la ombroplena ĉambro. Mi vegetaje ĝuas edenan feliĉegon, nur dezirante enradikiĝi kontraŭ tiu bierfontano. Post beata paŭzo, iom peza, mi forlasas la providencan azilon, kaj retrovas la aŭtomobilon kaj la legianon, ambaŭ konvene saturitajn. Baldaŭ ni kune ekvoĵiras por vespere trafi Reggan.

Senprokraste la nelacigebla suno nin kanonas per siaj oblikvaj saĝoj. La inkandeska tero malŝpare redonas la tutan varmon, kiun ĝi enbutikiĝis de la rubena aŭroro. Ni estas kondamnitaj al nepra punbrulego, ĉar ĝis nevidebleco la dezerto

incendias. La sorbita biero jam bolas en mia propra radiatoro, kaj trapore vaporiĝas. Mi malvolonte flueciĝas, pardonas miajn malamikojn kaj adiaŭas al mia familio. Maĝaje mi imagas mian ostaron blankiĝanta apud supersata ŝakalo, enkorre konfessas mian fidon al Ĉiopova Allah — laŭdata estu Lia sankta nomo — kaj serene atendas la lastan horon de tro mallonga vivo. La Satana krisolo min englutas por ĉiam.

Sed subite, kvazaŭ proksime al la horizonto, mi ekvidas strangan dometaron ĉirkaŭitan de kliniĝantaj palmoj, kies piedoj ŝlimludas en marĉeto glimanta. Surprizite pro la estado de tiu neatendita pejzaĝo, kiun mi tute ne konas, mi haltigas la diablajn kaleŝon, kaptas mian desegnoblibron, kaj rapide skizas la konturojn de la harmoniaj kupoloj, la siluetojn de la elegantaj daktilarboj, kiuj tremete speguliĝas en la ametista akvo. Kia freŝa spektaklo...

Necesos ke mi petu informojn pri la nomo de tiu rava paradizeto, ĉar certe mi revenos. Poste ni

velas al Reggan, la sudekstrema oazo antaŭ ol penetri en la timindajn senlimaĵojn de Tanezrouft. Ni atingas la meharistaran postenon, kie oni korduŝe akceptas la vojaĝintojn. En la oficira klubo mi ĝissatege sensoifiĝas, kaj proponas admirigi mian artan verkon. Mi abunde rakontas al miaj kamaradoj, ke je kelkaj kilometroj norden, mi vidis ĉarman palmareton nekonatan, kun lageto, jes vera lageto plena de vera akvo. Ĉe tiuj paroloj ili danĝere strabas. Ŝajnas, ke ili dubeme kapsvingas kaj komplete konsideras min. Tial mi fiere malfermas

mian kajeron, sed... konsterno... mi montras nur blankan paĝon, virgan kaj mokeman...

Mi desegnis MIRAGON!!!

Premegate pro tiu lasta bato de l' sorto, mi konfuze silentas, kaj diskrete ŝovas la nazon en mian duoblan viskion.

Kia tago, Dio mia!

Nun, se vi permesas — eĉ se ne — mi tuj iros preni duŝon kaj gluti plenmanon da kininaĵoj. Bonan nokton!



*Instruu*

# Esperanton

*al viaj infanoj*

Kun profunda ĝojo mi notas la fakton, ke por la unua fojo en la historio de la Universalaj Kongresoj oni iniciatos — en la kadro de la 41-a Universala Kongreso en Kopenhago — specialan aranĝon por esperantistaj infanoj. Dum longa tempo tio estis atendata, kaj la grava novaĵo instigis min rakonti iom pri la spertoj akiritaj kune kun miaj du knaboj (4½-jara Peter kaj 3-jara Ole), kiuj estas edukataj kaj en esperanta kaj en dana lingvoj.

Kiel la ideo venis en mian kapon mi ne klare memoras; sed ankoraŭ restas la impresoj, kiun faris komunikado pri la sukceso de s-ro Morariu kaj lia filino. Nur post longa tempo mi ekciis pri la laŭdindaj iniciatoj kaj agado de s-ro Moravec kaj kunlaborantoj en Germanujo.

Iom post iom post la naskiĝo de Peter la plano formiĝis, kaj finfine mi decidis, ke la ĉiutaga lingvo inter li kaj mi estu Esperanto. Tiu decido ne estis tiom facila, kiom ŝajnas nun meze de la

sukceso, ĉar familianoj estis kontraŭaj kaj konsideris la planon „nova kaprico de la strangulo”, kaj kelkaj esperantistoj juĝis ĝin troigo. Profunde pripensinte la aferon mi tamen venis al la konvinko, ke laŭ larĝa perspektivo tia plano tute ne estas stranga. Nur en pure unulingvaj regionoj oni opinias kontraŭnature uzi pli ol unu lingvon; sed ĉe la landlimoj la situacio estas eĉ rekte kontraŭa. Tie nepre necesas posedi plurajn lingvojn, almenaŭ du, kaj al tio oni facile alkitimiĝas jam de frua infanaĝo. Vidante la grandiozan perspektivon, kiun prezentas internacia lingvo mi do ne povis ne transdoni Esperanton al miaj infanoj.

En la praktiko la problemoj elmontras du diversajn flankojn: la internan kaj eksteran, la rilaton al la infanoj kaj la rilaton al la ĉirkaŭa medio.

La instruado mem prezentas neniujn eksterordinarajn malfacilaĵojn koncerne al la infanoj, se oni uzas la rektan metodon, sim-

ple alparolante ilin; sed ekstrema konsekvenco estas nepre kondiĉo por la sukceso. Neniam oni devas uzi la nacian lingvon pro eksteraj kaŭzoj kaj neniel pro tio, ke estas pli facile. Povas ĝeni, ke en la unuaj du jaroj oni devas senĉese paroli kaj senĉese ripeti esperantlingve frazojn, ne ricevante respondon; sed ankaŭ en la nacia

Ĝis la 3-a jaro la infanoj ne mem lingvo okazas ja simile.

konscias, ke temas pri du diversaj lingvoj. Ili scias nenion pri lingvoj, havas intereson nur pri parolado komunikilo kaj ĉiam celas la plej facilan solvon. Dum longa tempo Peter uzis en la nacia lingvo ekz. la esperantan vorton „lito” ne konante la danan vorton „seng”. Ordinara afero en ambaŭ lingvoj.

Oni povus fanfaroni dirante, ke Esperanto estas tiom facila, ke eĉ de la nasko la infanoj povas lerni ĝin; sed same facila estas ja ĉiu ajn lingvo. Akcentinde kaj grave estas tamen, ke infanoj en si mem havas senton pri la lingva logiko. La regulecon de la finaĵoj kaj de

la vortkunmeto ili kaptas tuj, kaj konata afero estas, ke en la naciaj lingvoj la infanoj mem formas laŭ lingva logiko vortojn, kiuj ne estas uzataj; sed kiujn oni bone povus uzi. Ekzemplo: en la dana lingvo tranĉilo = kniv, tranĉi = skære. Ofte oni aŭdas infanojn uzi la vorton „knive”, kiu ankaŭ signifas „tranĉi”, sed kvankam tute logika neniam estas uzata. — Ne konante la vorton „domo” Peter kelkfoje uzis la danan vorton „hus” kroĉinte al ĝi la finaĵon „o”, do „huso”.

Estas tre interese rimarki, ke neniel necesas devigo. Tute meminstige la du knaboj penas akiri al si parolkapablon. Kvankam ankoraŭ mankas vortoj al Peter, li jam parolas senĝene. Neniam li intermiksas la du lingvojn. Parolante kun sia panjo li povas turni sin al mi, subite ŝanĝi al Esperanto kaj senhezite daŭrigi la konversacion. Ankoraŭ Ole ne scias paroli senĝene kiel Peter. Li pene ekzercas kaj faras sian plejblon por esprimi sin en Esperanto, kaj en la lasta tempo li tre progresas. Krome validas por ambaŭ knaboj, ke ili komprenas ĉion, ankaŭ en okazo de ordinara parolrapido.

Oni aŭdas plendojn, ke mankas taŭgaj esperantlingvaj bildolibroj por malgrandaj infanoj; sed tiu manko ne gravas, ĉar la infanoj ja ne povas legi. Ili povas vidi la bildojn, kaj la plenkreskuloj povas esperantigi la tekstojn aŭ libere rakonti pri la montritaj situacioj.

De kelkaj flankoj esprimiĝas la opinio, ke Esperanto ne sufiĉas por la ĉiutaga vivo, ke mankas multaj vortoj kaj esprimoj. Post kvarjara ĉiutaga uzado mi venis al la rekte kontraŭa konvinko. Ne la lingvo estas malsufiĉa, sed mankas al ni uzantoj kapabloj eluzi la eblojn, kiujn la lingvo jam posedas.

La spertoj montras do, ke la interna flanko de la afero neniel prezentas malfacilaĵojn. Kontraŭe estas koncerne la eksteran flankon. Ĝi prezentas malfacilaĵojn, sed ankaŭ grandajn avantaĝojn. La malfacilaĵojn kaŭzas unuavice nekompreneblaj familianoj kaj konatoj. Ĝenas ilin precipe la ek-

sterordinareco de la afero, sed ankaŭ la senbaza imago, ke Esperanto neniam estontecon havas, ke ĝi estas nura fantaziaĵo ktp. ktp. Tiun ĉi lastan opinion mia edzino ne partoprenis; sed en la komenco la eksterordinareco ĝenis ŝin. Tial ŝi kelkfoje demandis, ĉu vere necesas paroli Esperanton en ĉeesto de gastoj aŭ gastigantoj. Mi bedaŭris ke jes, kaj interese estas, ke pli ol ofte la ĉeestantoj ekinteresiĝis — miris — admiris kaj mem rakontis pri propraj similaj spertoj aŭ pri spertoj aŭditaj. Kaj kiam ankaŭ konatoj, kiuj laŭ mia supozo estis akre kontraŭaj, reagis ĝuste tiel pozitive, tiam mia edzino ridante diris: „Neniam plu mi plendos”. Poste la afero evoluis tiel, ke en societo kun la infanoj kaj mia edzino mi kutimas nun uzi nur Esperanton.

Unu el la grandaj avantaĝoj estas, ke en tia agado oni havas eminentan propagandilon, kiu ekz. en la butikoj kontaktigas kun homoj, kiuj faras diversajn demandojn. Tiel oni havas okazon korekti la erarajn opiniojn, ke du-lingva eduko difektas la lingvosenton de la infanoj, ke Esperanto taŭgas nur por nenio ktp. ktp. Oni povas trankviligi la dubantojn dirante, ke eĉ se ankaŭ la patrino neniam parolus al la infanoj la nacian lingvon, ili lernus ĝin same bone kiel la aliaj infanoj. Tion montras amaso da spertoj. (Ĉetere la plej bona solvo estus, ke la patrino parolu Esperanton kaj la patro la nacian lingvon, ĉar la patro povas pasigi ĉe la infanoj nur kelkajn horojn ĉiutage kaj tial la lingva influo de la patrino estas senkompare multe pli granda ol tiu de li.) Krome oni povas montri, ke la lingvo vivas, ke hezitemuloj ne plu bezonas atendi de aliaj la unuajn paŝojn, ĉar tiuj paŝoj estas faritaj jam antaŭ longa tempo, kaj aliaj sekvas senĉese.

Alia grandega avantaĝo sekvas, ke ĉiutage oni mem ekzercas la lingvon en praktika uzado, kaj tiel oni iom post iom faras la lingvon aŭtomata funkcio en si mem ĝuste tia, kia lingvo devas esti por kontentigi ĉiujn bezonojn

Konduki la aferon al sukceso

oni ne povas, se oni konsideras Esperanton flankafere, efemera ideo sen ligo kun serioza celo. Oni devas esti tute konvinkita, kaj oni devas klare vidi ĝiajn utilon kaj raciecon. Krome necesas sufiĉe da kuraĝo por venki la malfacilaĵojn, necesas esti imuna kontraŭ la neevitebla moko kaj tiom persista, ke en la rilato al la infanoj oni neniam uzas la nacian lingvon, sed konstante agas laŭ la plano. Per tio oni nepre atingas gravajn rezultojn, ĉar la malfacilaĵoj, kiuj en la imago povas aperi grandegaj fariĝas en la realo, en la ĉiutaga vivo, relative malgrandaj kaj facile venkeblaj.

La hodiaŭa stato de la ankaŭesperanta edukado estas tia, ke oni havas fidindajn sciigojn pri ĉ. 100 familioj kun infanoj denaske esperantistaj. Altaj kaj dikaj ĉinaj muroj de nekompreneco kaj inerto estas rompitaĵoj. Tiu postulis montojn da pacienco kaj persistemo; sed sendube restas ankoraŭ multe da esperantistaj gepatroj, kiuj pretos fari la necesan laboron, sed kiuj ĝis nun ne ekhavis la ideon, aŭ ne sciis kion aŭ kiel fari. Kvankam 100 familioj kun verŝajne pli ol 200 infanoj estas relative multaj, tiuj 200 esperantistetoj povus esti kaj tre espereble fariĝos miloj. Tio dependas de la esperantistaj gepatroj, kies iniciato, agemo kaj persistemo povos en tiu kampo doni al la esperantismo fortan antaŭenpuŝon kaj plifortiki ĝiajn radikojn en la homaro.

Notinda estas la iniciato, de infana kongreseto en la kadroj de la venontjara Universala Kongreso. Persone mi konas la homojn kaj la cirkonstancojn de tiu aranĝo. Mi scias, ke la zorgo pri la infanoj estos unuaklasa, kaj tial mi povas varme rekomendi, ke oni eluzu tiun unikan okazon.

Esperantlingva eduko de la infanoj meritas plej grandajn atenton kaj apogon, kaj por la estonta evoluo de la tuta afero oni rajtas nun atendi, ke per forta kaj vasta kuraĝigo la plej altaj esperantistaj instancoj ekagos por racie kaj efektive kulturi la tre fekundan grundon.

*Ib Schleicher*

## AGADO ESPERANTISTA EN BRITA POPOLLERNEJO

**Raporto pri internacia Ekspozicio de Infandeseĝnaĵoj ĉe Temple Lernejo, Strood, ROCHESTER, Anglujo, de la 28a de novembro ĝis la 3a de dec. 1955**

En septembro 1955 „British Esperantist” raportis pri la oficiala enkonduko de Esperanto ĉe Temple Lernejo. La artikolo finiĝis per peto pri materialo por ekspozicio de infandeseĝnaĵoj. En la sama monato la lernejo aperigis anoncetojn en „Esperanto” kaj „Heroldo”. La ideo aranĝi modestan ekspozicion naskiĝis pasintan aprilon, kiam 20 membroj de la tiama neoficiala E.-klubo de la lernejo ornamis klasĉambron per bildoj senditaj de infanoj en Japanujo, Jugoslavio, Danujo kaj Finnlando. Estas menciinde, ke ĉi tiu videbla atestaĵo pri la utilo de nia movado estis grava faktoro en la oficialigo de Esperanto en tiu lernejo. Ankaŭ la artinstruisto entuziasmis, kaj la lernejo kontribuis al la japana projekto, „Infanoj de la Mondo”.

S-ro J. Jump, la organizanto, ne sukcesis kontakti Esperanto-instruistojn en kelkaj landoj, sekve li skribis anglalingve al pluraj fremdlandaj ambasadorejoj en Londono kaj al samnoma urbo (Rochester) en Novjorko, Usono, petante infandeseĝnaĵojn.

Je la 17a de aŭgusto Radio Moskvo anoncis, ke Sovetunio ekspedis 34 desegnaĵojn de rusaj geknaboj al la ekspozicio, kaj la radio-aŭskulta servo de „The Times” (ĉefa tagĵurnalo angla) aŭdis la sciigon kaj raportis ĝin mallonge. Tuj montris intereson la radia kaj televida servoj de la B.B.C. kaj ankaŭ sendependa televida entrepreno, kaj oni konstatis, ke necesos organizi pligrandskalan elmontron kaj al ĝi inviti grupojn de geknaboj el lokaj lernejoj — eĉ la publikon. Dum la trimestro,



De maldekstre: S-ro J. O. Hancock (lernejestro), S-ro Jan Suchánek (ĉefsekretario de la Ĉeĥa Ambasadejo, Londono) kaj S-ro J. R. Jump (instruisto kaj organizinto).



La ekspozicio.

infanverkoj atingis la lernejon preskaŭ ĉiutage, ĝis oni havis 1,300 desegnaĵojn el 25 landoj (4 kontinentoj).

La jenaj landoj kontribuis: Argentino, Aŭstrujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, (okcidenta kaj orienta), Hispanujo, Hungarujo, Izraelo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Lebano, Meksikio, Novzelando, Peruo, Pollando, Sovetunio, Svedujo, Svisujo, Turkujo kaj Usono.

La direktoro por edukado en Kent, s-ro E. W. Woodhead, malfermis la ekspozicion. La lernejestro, s-ro J. O. Hancock, aparte menciis la gravan rolon luditan de Esperanto en la organizado de la ekspozicio.

Inter la pli ol 4,000 gelernejanoj kaj 1,500 plenaĝuloj, kiuj dum la semajndaŭro de la ekspozicio vizitis la lernejon, troviĝis jugoslava kaj turka korespondantoj de B.B.C., turkaj ataŝeoj, kaj la Unua Sekretario de la Ĉeĥoslovaka Ambasadejo, kaj diversaj reprezentantoj de britaj instancoj. Per la radio kaj televido, kaj en multaj gravaj gazetoj, la afero estis raportata.

Oni jam aranĝas sendi la bildojn por publika montrado en aliaj britaj urboj. Tre grava estis letero proponanta helpon pri kolektado de desegnaĵoj el landoj ankoraŭ ne reprezentitaj en la ekspozicio, kiun sendis la estro de la agadkomitato de la Reĝa Societo de Artoj. La organizantoj malemas akcepti la proponon, anstataŭe sin turnas al Esperantistoj en Aŭstralio, Belgujo, Brazilo, Egiptujo, Grekujo, Irlando, Islando, Nederlando, Norvegujo, Portugalujo, Rumanujo, Maroko, Kanado, k.t.p. Urĝas la peto al samideanoj en la suprenmenciitaj landoj, kiuj povas ekspedi materialon por elmontri kiam la ekspozicio prezentiĝos en aliaj urboj. Tie Esperantistoj faros propagandon laŭ sia bontrovo: en Temple lernejo estis modesta pri-esperanta ekspozicio, kaj la katalogo enhavis unu paĝon en Esperanto kaj ne mankis aludoj al Esperanto sur la ceteraj!

Al ĉiuj kontribuantoj kaj, espereble, kontribuantoj, etendas varman dankesprimon la organizintoj ĉe Temple lernejo.

(laŭ raporto de E. R. Holt.)

# Interjuo

kun

## Paul Neergaard

Via libro "Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj" estas impona kaj akklamata apero en nia literaturo. Kion vi nun projektas, kovas, prilaboras?

Oni treege ĝojigis min per la simpatio, kiun renkontis mia libro pri plantmalsanoj. Espereble la cirkonstancoj ebligis al mi ankoraŭ publikigi verkojn, kiuj povos plenumi veran bezonon de nia juna literaturo. La cirkonstancoj, kiujn mi dezirus, estas: unue, ke troviĝu denove eldonejo same larĝvida kiel tiu de la menciita libro, nia Esp. Publishing Comp., kaj due, ke mi havu sufiĉe da tempo inter miaj fakaj okupoj. Mi nun ellaboras en dana lingvo popularan libron "Kiel la plantoj vivas?" en kunlaboro kun brila, juna dana desegnisto, kaj ĝin mi volonte esperantigus. Krome, mi havas materialon kaj emon por fari novan libron pri Enkonduko de vortradikoj en Esperanton, pritraktantan sufiĉe detale ankaŭ terminologiajn problemojn, i.a. en la lumo de la interlingvistikaj principoj de "skemeco" kaj "natureco", libron supozeble ĉ. 200-paĝan.

Vi skribis „penikŝimo“ anstataŭ penicilo. Kian rolon en Esp-o (botaniko kaj zoologio) havas la popolecaj terminoj apud la latinaj kaj grekaj derivaĵoj?

En ĉiuj naturaj lingvoj la popolecaj nomoj por plantoj kaj bestoj havas sian grandan valoron. Ili plenumas simplan bezonon, laikoj ne povas uzi "doktoran latinon" kiel sian ĉiutagan lingvon. Sponte kreiĝis en ĉiuj lingvoj miloj da nomoj por ĉiaj kreuloj, kiuj iel incitis la popolan fantazion, aŭ kies nomoj nepre devis eniri la ĉiutagan lingvon. Sed rimarku, ke tiaj popolecaj nomoj ofte ne kovras la sistematikajn unuojn de la botaniko kaj zoologio. La vorto *vermo* en la zoologia scienco estas afero tute diferenca de la vorto kiel uzata en la komuna lingvo, nu, kiel ekz. en la bela Kanto de l' trompito de Privat:

Dolĉan prenis mi persikon  
Kun vangetoj el purpuro.  
Sed vermajon kaj formikon  
Mi malkovris sub veluro.

Kaj kiom da sencoj ne povas havi la vorto *lilio*, kiu tute ne ĉiam egalas al la botanika genro *Lilium*. Entute, la popolecaj nomoj de plantoj kaj bestoj simpligas la lingvon, ĉar ili estas pli facile memoreblaj ol la sciencaj nomoj, kaj ĉar ili evitigas la enkondukon de multaj latingrekaj vortradikoj en nian komunan lingvon. Fine, ili esence kontribuas al la beletra valoro de Esp-o, prunteprenata, kiel ili estas, centope aŭ

milope el la suko kaj medolo de la etnikaj lingvoj, ĉerpataj el trezorejo alloga, kiu tamen, ni ne forgesu, ne tro delogiu nin for de tiuj necesaj, bazaj principoj de internacieco, kiuj ĉe ni ankaŭ devas iom regi en tiu sorĉa mondo de alegorioj kaj metaforoj.

En via libro "Fremdvortoj en Esperanto" vi konstatis, ke Esp-o transprenas vortojn (a) el antikvaj lingvoj laŭ la ortografio, kaj (b) el modernaj lingvoj laŭ la prononcado. Ĉu vi konstatas, ke tiuj tendencoj ankoraŭ regas?

Mia vidpunkto tiurilata ne estis kaj ankaŭ ne hodiaŭ estas tiel kategoria. Oni ne rigore skribas *ĉutbolo*, sed *ĉutbalo*. Ĉeftrajte, tamen, tiuj tendencoj sendube regas certgrade: *brigo*, *buti*, *ĉajna*, *ĵipo* (mi tre preferus *ĝipo*, pli laŭprononca kaj distinga de alia veturigebla ilo: *ŝipo*), *mitingo* estas kelkaj ekzemploj el la lasta kategorio, prenita el la nova suplemento al Plena Vortaro. Sed la metodo de devenigo ja ankaŭ dependas de la fontolingvoj. Ekz. en la angla lingvo, en kiu la prononco ofte multe kaj neregule diferencas de la ortografio, la laŭprononca devenigo sin nature altrudas.



Vi laboras sur internacia kampo ankaŭ pere de naciaj lingvoj. Ĉu vi konstatas en scienca terminaro malakordon ĉe diversaj nacilingvoj? Ĉu vi vidas en Esp-o rimedon por helpi al unuecigo de sciencaj afiksoj kaj terminoj?

Jes, altgrade, kaj en la formo, kaj en la sencenhavo de la terminoj ili ofte diferencas de lingvo al lingvo, eĉ se ili estas "internaciaj". La problemo de unuecigo estas sufiĉe komplika, kaj ĝi permesas skalon da vidpunktoj kompromisaj inter tiuj de ekstreme naturismaj formoj (kiel en Interlingua) kaj tiuj de relative radikale skemecaj formoj (kiel en Esp-o). Sed la internacia apliko de terminoj en la scienco ne estas nur problemo de izolitaj glosoj racie normigitaj, sed ankaŭ afero de rekta lingva praktikado inter sciencistoj en ĉiuj kampoj de la homa scio, kaj neniu pruvis, ke sciencistoj, krom eble ĝuste la lingvosciencistoj, pli facile lernas fremdajn lingvojn ol ĉiuj aliaj, ordinariaj, homoj.

Ankaŭ la sciencistoj tial bezonas la demokratian simplecon de la skemeca Esp-o, sed interne de la limoj de la fakaj lingvoj ekspluato de naturisme reguligitaj terminformoj devas, certgrade, esti prikonsiderataj sen antaŭjuĝoj de esperantistaj "puristoj" (Komparu ekz. la ekstreman ekzemplon de la fekunda terminlingvo de la kemio).

Kian evoluon vi esperas por la apliko de Esp-o en la scienco, en sciencaj medioj?

La uzado de Esp-o por popularigi la sciencojn pli servas al la komuna lingvo ol al la scienca evoluo de Esp-o, aŭ entute al la apliko de nia lingvo en la scienco. Estas necese, ke oni kreu la necesajn praktikajn kadrojn por ebligi al esperantistaj sciencistoj publikigi originalajn traktaĵojn en Esp-o. Kiam tiaj eksteraj kadroj, ĉefe en formo de revuoj, kiuj akceptos tiajn traktaĵojn, ekzistos (malmultaj tiaj revuoj nun ekzistas), tiam ekestos la necesa bazo por la sukceso de Esp-o en sciencaj medioj. Antaŭ ol tio okazos, la situacio ne estas tia! Mi proponis kaj esperas, ke ĝi realiĝos, planon, ke *Int. Scienca Asocio Esp-ista* eldonu *Oran Libron* okaze de sia 50-jara jubileo en 1956. Laŭ la propono la libro enhavus traktaĵojn ekskluzive pri originalaj esploroj faritaj de aktivaj sciencistoj esp-istaj. Ampleksa, serioza volumo da tiaj traktaĵoj estus grava dokumento por la pozicio de Esp-o en la internacia kulturvivo de hodiaŭ kaj kontribuus por plusekvi nian sukceson ĉe UNESKO.

Oni diras, ke, pro la agnosko al Esp-o de UNESKO, Esp-o eniris la etapon de oficiala rekonno. Kion vi opinias?

Ni ne estu tro optimismaj. La agnosko de UNESKO estas grava kuraĝigo, sed en si mem ĝi ne malfermos la pordojn al registaroj kaj aŭtoritatoj por oficiala enkonduko. Tion povas fari nur la faktoj, kiujn ni mem kreas: niaj kongresoj, nia literaturo, niaj servoj. Ilin ni plukonstruu! La enkonduko de Esp-o, pri kiu ni esperas, okazos malrapide — per la popolo por la popoloj.

Kaj fine, ĝenerale pri la Esp-o-literaturo?

La evoluo de la belliteraturo en nia lingvo ne estas malpli grava ol la evoluo de nia lingvo por sciencaj celoj, pri kiuj mi ĉi tie devis paroli kiel natursciencisto. Ĉiu konanto de Esp-o scias pri la eminenta evolukapablo de ĝia vortotrezoro. Tute esenca por la sukceso de Esp-o estas, ke la fakta evoluo de ĝia vortotrezoro okazu daŭre pli kaj pli per praktika lingva aktiveco skriba kaj parola, tiel ke la fiksado de la vortosencoj kaj la kreado de sinonimoj, kiuj — precipe la lastaj — ankoraŭ senteble mankas en Esp-o, kreiĝu ne tiom sur la skribtablo de diligentaj kompilintoj de vortaroj, kiom en la pulsanta vivo de nia lingvo kiel praktike uzata. Ankaŭ por atingi tion ni forŝiru la *urtikojn* de indiferenteco sur la vojo de niaj lingvoartistoj, kaj ni donu al ili la *rozajn* de atento kaj kuraĝigo, de ĝuo kaj dankemo.

# „LA TRAGEDIO DE LA HOMO” EN LA HUNGARA NACIA TEATRO

Grandega sukceso estis la revivigo de la granda poezia dramo de Emeriko Madách en la Nacia Teatro en Budapest. Post kelkjara silento denove ektondris la voĉoj de la homa lukto sur la unua scenejo de Hungarlando. La publiko jam delonge sopiris vidi tiun dramon, aŭdi la jam konatajn — ofte jam preskaŭ antaŭ la ekparolo de la aktoroj pense ripetitajn — versstrofojn de la poemverko! Jes, la arta kreaĵo de Madách tiom enpenetris en la hungaran vivon, ke multajn el liaj frazoj oni senkonscie eldiras dum la ĉiutaga vivo. Tio estas pruvo, ke tiu dramo ne estas ia abstrakta, al la popolo fremda verko, sed en ĝi renkontiĝas la nacio kun unu el siaj plej grandaj poetoj kaj filozofoj. La esperantistaro devas fieri, ke tiu majstra verko estas inter ĝiaj kulturtrezoroj en same majstra reverko de Kolomano Kalocsay, kaj ni povas esperi, ke eble estos iam universala kongreso kaj aktoraro, kiu prezentos tiun — certe laŭ mondskala mezuro — grandiozan teatraĵon antaŭ la esperantista publiko.

Komence oni rigardis ĝin, nur kiel „librodramon” eble tute ne presenteblan. Sed genia direktoro de la Nacia Teatro jam en 1883 prezentigis la tragedion en Budapest. De tiu tempo oni montris ĝin — ankaŭ en eksterlando — el diversaj vidpunktoj. Ofte oni vidis en ĝi nur vastan historian bildgalerion kaj oni precipe zorgis pri ĝia ekstera pompa vidindaĵo! Kaj eble ne estis tia prezentado, el kiu oni ne forlasis gravajn tekstpartojn. La plej nova reĝisado — komuna verko de tri lertaj reĝisoroj — zorge konservas la plenecon de la originala teksto kaj la purecon de la ideo por nefalsigi la dirindaĵojn de la poeto. Tion subtenas ankaŭ la



Sceno el „La Tragedio de l' Homo”

artaj kulisoj. Ĉiuj scenoj montras en bona ekvilibro la eksteran vidindaĵon de la Tragedio kaj ties pensesperojn, la interrilatojn de la individuo kaj de la amaso, de la viro kaj virino, la evoluon de la progresemaĵoj ideoj tra la ŝanĝemaj epokoj. La prezentado male al la antaŭmilita simbola, abstrakta ludo pliproksimigis al la rigardantaro per senpera, fidela kaj vera homeco la esencon de la verko.

Tiuokaze oni devas denove paroli pri la diskuto — jam preskaŭ centjara —, ĉu la Tragedio estas optimista aŭ pesimista poemverko? Por kompreni ĝin oni devas scii, ke tiu senkompara artaĵo de la hungara literaturo — nun jam inda parto de la mondliteraturo kaj fieraĵo de nia esperanto literaturo! — naskiĝis en la koro de tre trista kaj trompiĝinta viro. Li vivis tiam ermitan vivon en malgranda vilaĝo, — kiu apartenas nun al Slovakio — kaj same lia propra sorto, kiel tiu de la hungara nacio estis tiutempe tre malluma. En tiu periodo de sia vivo — forlasita de sia edzino, kiu estis ne nur malfidela, sed poste fariĝis ĉiam pli malmorala, — Madách verkis, — kvazaŭ dolorsuferanta konkbesto la perlon — sian majstroverkon! Dum la hungaraj liberecbataloj de 1848-49 li estis juna patriota soldato, ardis por la libereco, por la progreso, por pli altaj ideoj kaj poste devis vidi la malvenkon, la falegon, la regadon de la absolutismo de habsburga regado super sia patrujo, la nesukceson de la revolucioj en aliaj landoj de Eŭropo. La tuta sorto de la homaro estis malluma antaŭ li. Oni eĉ rakontas, ke origine la verko finiĝis sen la optimistaj vortoj de la Sinjoro: „Mi diras hom’, penu kaj fide fidu!” Laŭdire tiun finon sugestis alia fama hungara poeto, verkisto de plej valoraj poemoj kaj baladoj: Johano Arany kiu ĉiel helpis la konatigon kaj sukceson de la Tragedio al ties glora vojo! Sen tiu fina frazo eble la dramo lasus la saman senton en la homo, kiel la majstra poemverko de nia esperantista poeto John Francis: „La Kosmo”: „Senvive sin etendas vakua firmamento!” Sed la prezentado ne sentigas tion! Kiel hungara kritikisto Lajos Gogolák prave skribas: „Vere la homa sorto travagas tra multaj luktoj kaj ŝanĝoj inter nombraj krizoj, sed ĝuste tio donas enhavon al la vivo de Adamo, ke li penu kaj fide fidu. Madách laŭ sia propra rigardmaniero donis eksteran, superteran kadron al sia verko, la internan luktheadon, personigite kaj eksteren projektite, de la homo. Sed tra la tuta historio la homo tamen batalas sian batalon kun si mem, kun siaj cirkonstancoj kaj ankaŭ al la daŭrigo de la lukto li ĉerpas forton el si mem, kiam li ekaŭdas de Eva la daŭrigon, la belan saluton de la estonteco: naskiĝos ido. La prezentado finiĝas per tio, ke Adamo



prenas la trabon por konstrui kabanon por ili du kaj por la naskiĝonta gento... Al la publiko de niaj tagoj sendube tiu homeco finluktante ĉiujn batalojn, fidante en si mem kaj en la estonteco, efikas plej forte. Ni tiam komprenas vere la Tragedion, se ni rigardas la poeton kaj lian verkon en ilia propra epoko. En la mezo de XIX-a jarcento naskiĝis tiu ĉi drama poemo kaj ĝin kreis tia homo, kiu malgraŭ la premaj, malriĉaj cirkonstancoj de lia ĉirkaŭaĵo kreis ion grandan. Madáč estis la filo de sia epoko, kiu kuraĝe luktis kaj diskutis kun ĉiuj problemoj kaj tendencoj de la epoko, kaj rigardante la ŝanĝojn de la homa historio lin gvidis la ideo de la homeco kaj de la libereco." Ni ĝoju,

ke tiun ĉi verkon en inda traduko interpretis por la esperantistaro nia hungara poeto Kalocsay, riĉigante per ĝi nian lingvon, pliligante ĝian kulturvaloron. Lingvo, kiu povas redoni tian tuthomaran ĉefverkon, estas unuaranga kulturlingvo. Ankaŭ por ni donas do la Tragedio en sia esperanta formo en la nunaj militmallumaj tempoj, ĝenerale home kaj aparte por nia lingva movado: fidon, ke ni ne penas vane — ni havas estontecon, se ni ĉerpas, kiel Adamo, la forton el ni mem kaj inter malfacilaĵoj, seniluziigoj kaj baroj antaŭeniras kun fidanta fidol!

Paŭlo Balkanyi, Budapest

## ★ La Jubilea Eposo ★

*Por signi la kvindekajn de la Universalaj Kongresoj, Roland Dupuis projektis, kaj en Bolonjo brile realigis, la JUBILEAN RAPSODION. Reto Rossetti estis komisiita verki la 'ĵaden-eposon', kies celo estis skizi la evoluon de la homo kaj de la komunlingva ideo el praepoko ĝis plej freŝa tempo, kaj tiele prezenti la teatrajn scenojn kaj kunligi la tuton. Jen estas la lasta parto el tiu eposo, temanta pri la kampanjo ĉe UNESKO kaj poste.*

Antaŭen nun kun freŝa energio!  
La deksepmiliono peticio,  
pri kiu ni parolis, estis preta:  
jen baza ŝtono por labor' konkreta.  
Ricevis ĝin Unesko en Parizo,  
sed nevolonte. Estis ja surprizo  
tre malagraba... Kelkaj frenezuloj  
elĵonglis tion ĉi per manipuloj,  
sendube. Esperanto estas nur...  
kaj tiel plu. Kaj tamen staris sur  
tagordo tiuj dek ses milionoj:  
ŝtatestroj, profesoroj, gravaj homoj...  
Tre ĝene. Nu, ni forregalu ĝin.

— Jen estis do la horo de l' destin',  
kaj ĝin renkontis ni kun ardo plena.  
Jam en Parizo Profesor' Lapenna  
laboris tage-nokte, sub inkubo,  
kaj je la fino la unua ŝtupo  
estis venkita. Oni ja konsentis  
esplori la aferon. Ni kontentis —  
kaj tuj komencis vigle organizi  
rimedojn, kaj la fortojn mobilizi.

La celo nun fariĝis: Urugvaj'.  
Jam nia centro de Esploro kaj  
Dokumentado ŝvitis en preparoj  
por forta puŝo kontraŭ la remparoj  
Uneskaj. Sin dediĉis al la tasko  
multlandaj homoj en konkorda fasko.  
Kaj multo restis plenumota, jes.  
Car post la jaro mil naŭ dudek ses  
neniu nombris la esperantistaron.  
Necesis do refari tiun faron;  
kaj efektive pri l' movado tuta  
nescio estis vasta kaj akuta.  
Ni ĝeneralis, riskis aŭ konjektis,  
kaj eble ian proksimumon plektis,  
aŭ eble nur parolis laŭ hazardo.  
Pri tio do la vigla avangardo  
okupis sin. La plano ekprosperis,  
kaj dokumentojn oni disliveris  
al registaraj fakoj, al Unesko  
kaj kulturcentroj en abunda kresko.

Finfine ĉio estis tute preta  
por ofensivo firma kaj impeta;  
kaj ekveturis nia advokato,  
Doktor' Lapenna, sperta diplomato,  
juristo kaj potenca oratoro.

Renkontis sin la Viro kaj la Horo!

Trans Atlantikon portis lin la ŝipo,  
for al la sudo, for el nia kono;  
sola al granda tasko, kun ekipo  
de l' scio, pravo kaj l' anima sprono.  
Kaj tuj en la Novmonda regiono  
samideanoj vervaj lin renkontis  
kaj sin kunigis je bataliono,  
el kiu celkonscia ardo fontis.  
Ekspozicion oni vigle muntis  
plej grandiozan en la historio,  
per kiu nia lingvo larĝe buntis  
en dokumenta manifestacio.  
Sed ĝin ignoris la Delegacio  
Uneska. Antaŭjuĝoj ĝin venenis...  
kaj dume ni, angore kaj sen scio,  
esperon kontraŭ senespero trenis —

ĝis jen, mirakla sortoturno venis.

*Ni scias nun pri l' tufa epopeo:  
kiel, sub ĉia baro kaj opono,  
li ŝiris el la ŝaŭko de perejo*

*la venkon, per potenco de la kono  
kaj vervo de l' obstino. Li ĝin prenis  
per rajt' natura, kiel pandiono*

*la salmon; kaj, se tamen iom svenis  
la fortoj pro la longa streĉo dura,  
la ardo de l'animo lin subtenis.*

*Li, en kiraso de l' kuraĝo nura,  
kiu penetris en la bastionon  
kaj ĉiujn pelis al paniko kura,*

*por nova cel' nun levas klarionon.  
Ho, se lin nur apogos la armeo,  
ni povus jam sieĝi Babilonon*

*por granda, fina venko de l' Ideo!*

Por tio nun la fortoj sin agordas,  
por tio nun ni ardas ĉiuloke;  
en kuna streĉo gaje ni konkordas  
kontraŭ la blinda, kiu premsufoke  
minacas nin. Ni ridas tion moke,  
ĉar nun, en la etapo de l' Rekono  
Oficiala, levas sin aroge  
kuraĝo de la verda eskadrono.  
Tra l' tendoj jam disiris la ordono:  
*La lingvo en la ĝeneralan uzon!*  
Ni strebu, en ekzalta unisono,  
likvidi inter gentoj la konfuzon,  
kiel ni bele en Bolonjo faras,  
sub la itala suno kaj lazuro,  
kie la homoj feste solidaras.  
Jes, tie ĉi la horo de l' Futuro  
heroldas sin per hela uverturo!

PLEJ KARAJ GEAMIKOJ! Vi aŭskultis  
rakonton, kie svarmis kaj tumultis  
la nomoj de personoj eminentaj,  
kiuj per laboregoj diligentaj  
la torĉon portis alte de l' Afero  
en plej diversaj landoj de la tero.  
Nun laste mi prezentas unu homon:  
li havas ja nek nomon, nek renomon,  
sed estas li plej grava el la tuto  
kaj, pli ol ĉiuj, inda je saluto.  
Li estas la ADEPTO ANONIMA,  
kiu en ĉiu loko, kun senlima  
obstino kaj dediĉo kaj modesto,  
laboras sen rekono, sen atesto,  
por nia kara lingvo. Li plenumas  
volonte ĉiajn devojn, kaj konsumas  
ofere sian tempon kaj rimedojn,  
senplende elportante ĉiajn tedojn.  
En li, ĉar li la lingvon kore amas,  
la fajro de l' fervoro pure flamas  
sen penso pri mencio kaj agnosko.  
Sed certe nia Esperanta bosko  
el li kaj liaj fratoj konsistiĝas,  
kaj dankan penson ni al li dediĉas!  
Ne povas li aperi sur podio,  
ĉar li, modesta, taksas sin nenio.  
Tamen aliaj tie ĉi kunestas,  
kiuj simile kiel li modestas,  
kaj kiuj firme servis al la celo  
tra tempoj de la helo kaj malhelo,  
dum jarodekoj. Jen la pioniroj:  
plej honorindaj, tute sen spiroj  
al propra gajno aŭ brilanta gloro.  
Al ili estu danko kaj honoro!

Reto Rossetti

## Defendo de U.E.A.

### LA PREZIDANTO DE U.E.A.

En la februara numero de nia revuo mi aperigis artikolon, en kiu mi atentigis pri la kontraŭ-asocia agado de la redaktoro de „Amerika Esperantisto”. Ĉar mi poste eksciis, ke li distribuis siajn kalumniajn artikolojn en formo de pamfleto al esperantistoj en la tuta mondo, mi kiel prezidanto sentas min devigata fari la jenan respondon:

Pri la gvidaj instancoj de la asocio S-ro Connor skribas: „Tiuj respondecaj, — kiuj alportas absolutisman tendencon al nia movado, neniam malkaŝos siajn intrigojn”. La fakto estas, ke en UEA ĉiuj decidoj estas faritaj laŭ demokratiaj principoj de libera diskuto kaj plimulto. Neniam en la historio de UEA iu decido estas trudita de malplimulto. Sekve la parolo de S-ro Connor pri „absolutismo” estas ne nur malvera sed absurda.

S-ro Connor asertas: „La nuna UEA rapide glitas al ignoro pri la rajtoj de la landaj asocioj.” Al UEA neniam alvenis de iu landa asocio, ankaŭ ne de EANA, iu plendo ke ĝiaj rajtoj estas ignorataj. La rajtoj de la landaj asocioj estas klare fiksataj en la statuto. Cetere la komitatoj, el kiuj ne malpli ol 78% estas elektitaj ĝuste de la landaj asocioj, apenaŭ volas aŭ povas spiti la interesojn de siaj propraj landaj asocioj. Sekve la aserto de S-ro Connor estas senbaza, sed evidente farita por krei malkonfidon kaj malkonkordon inter la esperantistoj.

S-ro Connor skribas, ke par. 13 de nia statuto tekstas: „UEA akceptas el unu regno nur unu landan asocion”. Li false citas tiun paragrafon, kiu diras: „Principe UEA akceptas el unu regno nur unu landan asocion.” La Komitato jam pli frue, kiam la cirkonstancoj kaj la interesoj de la movado tion postulis, akceptis plurajn landajn asociojn el unu regno, ekz. en Belgujo kaj Jugoslavio. Dum la kongreso en Bologna la Komitato unuanime akceptis kiel aliĝintan asocion Esperanto-Ligon por Nord-Ameriko por doni eblecon al la tre multaj samideanoj en Usono, kiujn S-ro Connor eksigis el EANA aŭ kiujn li rifuzas akcepti en EANA, pere de landa asocio aliĝi al UEA.

S-ro Connor skribas, ke Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA) estas „maldekstra organizo”. Laŭ sia statuto ELNA estas neŭtrala, demokrate organizita asocio, libere aganta en Usono laŭ tieaj leĝoj kaj gvidata de plej elstaraj kaj sindonaj esperantistoj de Usono kiel S-roj Parrish, Sayers, Sherer kaj aliaj. Sekve S-ro Connor kalumnias senbaze landan asocion, aliĝintan al UEA, kaj ties gvidantojn.

S-ro Connor mensoge asertas, ke en la Komitato de UEA estas „7 voĉoj el la absolutisma regno de Tito”. La landaj asocioj de Jugoslavio havas en

la Komitato ne 7 sed 4 komitatojn elektitajn konforme al nia statuto, kaj tiuj komitatoj ĉiam plej lojale kunlaboris kaj senescepte respektis la neŭtralecon de UEA.

S-ro Connor asertas, ke la nuna UEA estas regata de „nova monolita principo de maldekstra universalismo”. La fakto estas, ke UEA estas regata de la noblaj ideoj, kiujn inspiris al la lingvo la genio de D-ro Zamenhof kaj kiujn metis en ĝiajn fundamentojn la fondinto Hektor Hodler. Tiuj principoj estas fiksataj en par. 3 kaj 4 de la statuto. UEA estas kaj restos absolute neŭtrala kaj universalista. En ĝi trovas lokon ĉiuj esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj akceptas kaj respektas tiujn principojn. UEA ĉiam defendis kaj ankaŭ estonte defendos sin kontraŭ ĉiuj provoj utiligi la Asocion kiel instrumenton de kiu ajn politika koncepto. Verŝajne ĝuste pro sia rigore observata neŭtraleco UEA nun estas atakata de S-ro Connor pro „maldekstra universalismo”, dum aliflanke kaj samtempe kelkaj elementoj ekster la Asocio atakas ĝin kiel „burĝe kosmopolitan”. La politika altrudo de S-ro Connor endanĝerigas la neŭtralecon de la Asocio.

Por semi malkonfidon inter la esperantistoj li emfazas pri „amasaj eksigoj” de estraranoj, komitatoj individuaj membroj. Eksigis inter 40 komitatojn nur 3, kaj tiuj evidente ĉar ili ne emis konformiĝi al la decidoj de la plimulto. Antaŭ la Bologna kongreso eksigis la tuta estraro por doni al la Komitato la eblecon tute libere elekti novan estraron. La rezulto estis ke oni reelektis 3 kaj novelektis 2 estraranojn. Rilate al la individuaj membroj la aserto de S-ro Connor estas eĉ pli kurioza, ĉar ĝuste en la jaro 1955 vere amase alvenis novaj aliĝoj, tiel ke UEA finis la jaron 1955 kun pli ol 20.000 membroj, cifero neniam antaŭe atingita en la tuta historio de la Asocio.

En siaj artikoloj S-ro Connor plurloke kalumnias kaj insultas nian ĝeneralan sekretarion, misrepresentante lian personon, lian agadon por la movado kaj por UEA, per kio S-ro Connor malutilas ne nur al li persone sed ankaŭ al la intereso de Esperanto.

Mi estas malfeliĉa, ke pro la supraj kaŭzoj mi devis fari al la Komitato proponon pri eksigo de s-ro Connor el la Asocio. Mi informis s-ro Connor, ke laŭ la Statuto kaj Ĝenerala Regularo li havas la rajton sendi sian defendon en la daŭro de 30 tagoj post ricevo de la supra plendo. Se lia respondo venos en la fiksita tempo, ĉiu Komitato ricevos kopion antaŭ ol mi voĉdonigos la Komitaton pri la propono. Dum longa tempo mi hezitis antaŭ ol mi faris la decidon. Ĉar s-ro Connor en sia lasta artikolo diras, ke li intencas daŭrigi la klaĉadon kontraŭ UEA kaj ĝiaj funkciuloj, mi kiel Prezidanto devas defendi la Asocion kontraŭ tiaj subfosaj atakoj.

E. MALMGREN.

### LA ĜENERALA SEKRETARIO DE U.E.A.

S-ro G. Allan Connor, redaktoro de Amerika Esperantisto, aperigis en la Jul/Okt kaj Nov/Dec numeroj de tiu revuo du pliajn atakojn, en kiuj ordinariaj mensogoj kaj kalumnioj konkurencas kun ofendoj kaj insultoj. La kaŭzo de la ĉi-foja ondo de malamo estas sendube la fakto, ke la Komitato de UEA en Bologna unuanime — kaj konforme al la Statuto — akceptis la aliĝon de ELNA.

En liaj skribaĵoj troviĝas tiom de malveraj aŭ misprezentoj, kiom da asertoj ankaŭ pri mi persone. Tial mi sentas min devigita — certe ne por polemiki kun la redaktoro de AE, por kiu tio vere estus tro da honorigo — deklari, en la intereso de la vero:

S-ro C. substrekas en ambaŭ numeroj, ke Jugoslavio havas 7 komitatojn en UEA kaj inter tiuj 7 kalkulas, evidente, ankaŭ min. La 4 landaj asocioj de Jugoslavio havas ne 7, sed 4 komitatojn konforme al la nombro de siaj membroj kaj al la Statuto. Mi mem ne estas komitato C., kiel erarige asertas la verkinto, sed komitato B., reprezentanta la individuajn membrojn. Cetere, en la jaro 1949 mi definitive forlasis Jugoslavion, perdis tiuokaze por la tria fojo en la daŭro de dek jaroj mian tutan havaĵon, rezignis pri mia Universitata katedro kaj aliris la dornan vojon de rifuĝinto. De tiam mi estas sen ŝtatareco kaj havas absolute nenian rilaton kun la registraro de Jugoslavio.

Diference de la misprezentoj de S-ro C., estas vero, ke mi libervole, kiel ordinara civitano, ne apartenanta al kiu ajn politika partio, aliris la liberigan, senfine malfacilan militon de mia popolo kontraŭ la invadintoj de mia lando. Ankaŭ nun, malgraŭ la postaj seniluziigoj, mi estas fiera, ke mi povis partopreni en tiu batalo, kiu siatempe elvokis la admiron de la tuta libera mondo. La redaktoro de AE devus ne forgesi, ke la Nacilibera Armeo de Jugoslavio estis dum la milito aliancano, eĉ tre laŭdata aliancano, de Usono.

Ĉiu, kiu interesiĝas pri mia persona mondrigardo — kaj tian mi kompreneble havas, eĉ tre fortan — povas facile ekoni ĝin el multnombraj fakaj artikoloj kaj pluraj libroj aperintaj en kelkaj lingvoj kaj trovemblaj en kiu ajn faka biblioteko de la mondo. Kiu ne scias tiujn lingvojn aŭ ne havas tempon, tralegu la verkon „Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo”, aŭ almenaŭ la du liniojn de ĝia dediĉo!

La redaktoro de AE insulte atakas min pro mia artikolo „Sur la sojlo de nova epoko”, aperinta en la oktobra numero de „Esperanto”. Laŭ sia kutimo — la samon li faris kun la artikolo de T.J. en Heroldo, pro kio li jam ricevis

bonan vangofrapon de la redaktoro de tiu gazeto — li prenis el mia artikolo nur la parton, kiu rilatas al signoj de revigliĝo de la Esperanto-Movado en orienteŭropaj landoj, sed li intence ellasis ĉion, kio rilatas al la atingoj de Esperanto en Okcidento. Per tio li deziras doni specialan koloron al mia artikolo, kiu havis la celon koncize skizi la situacion kaj perspektivojn de Esperanto komence de la nova laborsezono. Mi konsilas al ĉiu esperantisto relegi tiun artikolon por mem konstati ĝis kiu punkto povas iri la malico.

S-ro C. diras, ke la „ĝeneva spirito” „dekompence montriĝis kiel nur ruĝa fantomo”. Tiu aserto montras aŭ kompletan politikan analfabetismon de la skribinto, aŭ malkovras novan malicon. La esprimon „ĝeneva spirito” ne elpensis mi, sed pri ĝi skribis la tuta demokrata gazetaro de la mondo. Por mi kiel esperantisto tiu „ĝeneva spirito” estis kaj estas interesa tiom, kiom ĝi promesas malstreĉiĝon de la tensio en la interŝtataj rilatoj kaj plivigliĝon de la internaciaj kontaktoj inter ordinaraj homoj, do kreon de pli favora grundo por la laboro por la Internacia Lingvo. Eĉ komencanto en la Esperanto-Movado hodiaŭ espereble komprenas, ke la progresado aŭ stagno en la disvastiĝo de Esperanto multilate dependas de la grado de vigleco kaj denseco en la internaciaj kontaktoj de ordinaraj homoj. Cetere, se vere „ĝeneva spirito” estas nur „ruĝa fantomo”, tiam en la kreo de tiu „ruĝa fantomo” certe ne partoprenis mi, sed la ĉefoj de registaroj, kunvenintaj en Genevo, do, inter la aliaj ankaŭ la Prezidanto de Usono. Vere estus tempo ke oni ĉesu skribi stultaĵojn!

Mi lasos flanke ĉiujn personajn ofendojn kaj insultojn, kiujn donis al mi s-ro C. kaj kiuj montras, milde dirite, ke tiu sinjoro antaŭ ol fariĝi sekretario de landa asocio estus devinta preni ie kelkajn lecionojn pri elementa edukiteco. Mi haltos nur je lia aludo sub citosigno pri mia „rolo en UEA”. Pri tio li skribas en ruze aranĝita kunteksto kun la celo subkomprenigi kaj sugesti ion teruran. En UEA mi havas kaj plenumas laŭ mia ebleco precize tiun rolon, kiun donas al mi la Statuto, la regularoj kaj la instrukcioj de la Komitato. Pri mia laboro kaj aktivecoj en la Asocio kaj en la Movado ĝenerale scias aŭ almenaŭ povas scii ĉiu esperantisto, ĉar pri tio regule aperas raportoj kaj informoj. Tute speciale tiujn aktivecojn bone konas la multnombraj kaj sindonaj kunlaborantoj de CED, de la informaj fakoj kaj de la eksteraj rilatoj, inter kiuj troviĝas la plej elstaraj esperantistoj de la mondo. Pri mia laboro povas juĝi la tutmonda esperantistaro. Pri ĝi juĝos ankaŭ la historio.

Kiel ordinara esperantisto mi ĉiam komprenis kaj komprenas mian rolon en la Movado kiel devon labori por la interesoj de la Internacia Lingvo kaj laŭ miaj modestaj fortoj defendi ĝin kontraŭ ĉiuj atakoj tute egale ĉu ili venas de tiu aŭ de alia flanko. Tiel mi ankaŭ komprenas la neŭtralecon de la Asocio.

Kvankam UEA estas kaj nepre devas esti politike plene neŭtrala, tamen, laŭ mia opinio, tiu neŭtraleco ĉesas precize tie, kie komenciĝas la rektaj atakoj kontraŭ Esperanto fare de kiu ajn politika movado, partio aŭ grupo. Precize tiel mi ĉiam agis, skribis kaj parolis — kaj la samon mi faros en la estonteco — en mia tuta poresperanta laboro. Tial mi persone havis kaj havas negativan starpunkton rilate ĉiujn politikajn reĝimojn, kiuj malpermesas la Internacian Lingvon. En tiu senco mi skribis grandan nombron da artikoloj, kies esenco povas mallonge resumiĝi en la konkludaj vortoj de la verko „La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto”, kie mi diris sur la paĝo 174:

„Ne estis hazardo, ke la reĝimo de Hitler per la fama Dekreto de Martin Bormann en junio 1936 malpermesis Esperanton kaj la Esperanto-organizaĵojn en Germanujo. Ankaŭ ne estis hazardo, ke en ĉiuj landoj, kiujn subpremis la nazia boto, la Esperanto-Movado ĝisvivis la saman sorton. Ne estas, fine, hazardo, ke laŭ la Dekreto n-ro 0054 de la 28-a de novembro 1940 de la popolkomisaro pri internaj aferoj en Litovujo, la esperantistoj estas konsiderataj kiel elementoj „kontraŭsovetaĵaj kaj socie fremdaj” (p-to j. de la Dekreto). Ĉio ĉi klare montras kiel forta kaj granda estas la idea valoro de la Internacia Lingvo. Estas nur bedaŭrinde, ke tion vidas pli bone la malamikoj de la Internacia Lingvo kaj de la ideoj esence ligitaj al ĝi, ol tiuj, kiuj pro sia sincera deziro al internacia kompreniĝo kaj monda paco devus esti ĝiaj naturaj amikoj.”

Tia estas mia starpunkto. Kaj tia ĝi restos.

En tiu tuta kampanjo la plej doloriga por mi estas la malbono, kiun oni kaŭzas al la interesoj de Esperanto. La pli ol bedaŭrinda vero estas, ke jam plurfoje en la historio de la Esperanto-Movado — kutime en la periodoj de atingitaj sukcesoj kiuj promesadis novajn venkojn — iu speco de individuoj detruadis la longjaran laboron de multaj sindonaj esperantistoj kaj per siaj senrespondecaj agoj forigis el niaj vicoj la plej agemajn batalantojn. Pri tiu kategorio de „esperantistoj” d-ro Zamenhof diris:

„Per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi.”

Ni esperu, ke la bona laboro de ELNA sukcesos baldaŭ restarigi en Usono la dignon de la Esperanto-Movado, kiun ĝi riskas perdi pro la „freneze erara agado de kelkaj esperantistoj”, por citi frazeron el la bulteno de la Esperanto Klubo en Washington.

D-ro Ivo Lapenna

## ESPERANTISTA VIVO

### Naskiĝoj

**Iggers.** La 29an de oktobro pasintjara naskiĝis Karl Jonathan, tria filo de Ges-roj Georg G. Iggers, 1118 Izard Street, Little Rock, Ark., Usono.

**Treurniet.** En Rotterdam, la 20an de decembro naskiĝis Francisko Esperant Enriko, frato de Freddie kaj Susan, kaj filo de Ges-roj Treurniet, Noorderhavenkade 76c.

### Fianĉiĝo

**Heskes-Ribot.** F-ino Corrie Heskes, el Hago, kaj S-ro André Ribot, Ĝenerala Sekretario de la Franca Esperantista Unio, estas feliĉaj informi pri sia ĝefianĉiĝo.

### Jubileo

**Le Seac'h.** La unuan semajnon de januaro festis Ch. Le Seac'h, nia estimata Delegito en Quimper, Francujo, sian Oran Jubileon de esperantisteco. Dum 50 jaroj li laboris por nia afero, kaj niaj legantoj certe memoras lian interesan artikolon „Ranlando” en nia jul-aŭg. n-ro 1955. Gratulon al li!

### Honorigo

**Llech-Walter.** Rekompenca de la servoj faritaj por Edukado pere de la instruado de Esperanto, la Franca Ministro pri la Nacia Edukado ordenis S-ron René Llech-Walter, Estrarano de UEA, Oficiro de la Publika Instruado. Tiu agrabla informo sendube ĝojigos la tutan esperantistaron. Ni tutkore kaj arde gratulas.

## NEKROLOGO

**Barret.** La 20an de decembro mortis 75-jara en Lamarche (Vosges), Francujo, F-ino Fernande Barret, eksvicprezidantino de la Norda Federacio. Ŝi estis esperantistino de 1905, kaj bone konata de multaj samideanoj.

**Bisetti.** Kun malĝojo ni anoncas la morton, je la 13a de oktobro 1955, de samideano Aleviano Bisetti. Li estis tre malnova kaj agema samideano kaj membro de UEA. Kiel instruisto de Esperanto li havis inter siaj lernantoj ankaŭ profesoron Canuto.

**Cresp.** Mortis en sia 79a jaro s-ano Charles Cresp, Cannes, Francujo, post plurjara malsano. Lia tuta vivo estis dediĉita al la diskonigo de Esperanto, kaj li estis unu el la pioniroj, kiuj ĉesis la Unuan Kongreson en Boulogne.

**Günalp.** La 30an de oktobro 1955 forpasis en Istanbul nia samideano H. Cecil Günalp, post longa malsano. Li estis fondinto (1924) de Turka Esperantista Societo en Istanbul.

# 41-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago - Danlando

4. aŭgusto - 11. aŭgusto 1956

## OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 4

Februaro 1956

**Adreso:** 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

**Banko:** Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

**Poŝtĝirkonto:** 41-a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.

**Nova ĵaka Kunveno:** Internacia Asocio de poŝtmark-kolektantoj, s-ro Ingemar Nordin, Skolvägen 8, Arjäng, Svedujo.

**Prezroj de Litoj:** Jen provizoraj prezroj.

En Hotelo:

Kategorio A 20/40 danaj } sen  
" B 14/24 kronoj } maten-  
" C 11/16 } manĝo

Ĉe Privatuloj: proks. 10 danaj kronoj, sen matenmanĝo.



En Komuna Loĝejo: 6 danaj kronoj, kun matenmanĝo.

Disponante ne multajn litojn kaj precipe ne unulitajn ĉambrojn, L.K.K. tre rekomendas la Komunan Loĝejon.

Bonvolu ne mendi antaŭ ol vi ricevos mendilon kun la Dua Oficiala Bulteno en februaro.

**Literatura Kaso:** Por apogi la Esperanto-literaturon, L.K.K. decidis aliformigi la Donacan Kason al „Literatura Kaso“.

Ĉiu mondonaco alveninta aŭ alvenonta al la Kongreso estos transdonata al la Belarta Konkurso por konsistigi ĝiajn premiojn.

**Statistiko:** (ĝis fino de januaro): Alĝerio 2, Argentino 1, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 6, Belgujo 4, Brazilo 2, Britujo 97, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 201, Finnlando 60, Francujo 115, Germanujo 85, Hispanujo 10, Islando 7, Italujo 99, Jugoslavio 53, Kanariaj Insuloj 1, Kanado 2, Kongo Belga 2, Maroko 7, Meksikio 1, Nederlando 53, Norda Rodezio 1, Norvegujo 53, Novzelando 1, Portugalujo 2, Svedujo 179, Svisujo 19, Turkujo 2, Usono 9, Venezuelo 1.

Sumo: 1080 el 31 landoj (pasintjare 900 el 26 landoj).

GIAN CARLO FIGHIERA  
Konstanta Kongresa Sekretario

## Kongreslanda Branĉo de la Belarta Konkurso 1956

La unuan fojon anoncas UEA la t.n. „Kongreslandan Branĉon“ de la Belarta Konkurso kun la celfiksado, akceli la kulturperadon ĝuste el la lingvo de la kongresa lando. Ĉiokaze oni anoncas konkurson por la traduko el la dana lingvo en Esperanton. La konkursantoj devas traduki en poezia formo la sestrofan poemon de *Emil Aarestrup: Jorden*, kaj la plej elstara konkursaĵo estos premiita laŭ la modelo de la ceteraj branĉoj. La konkursaĵojn oni sendu al la peranto, s-ro K. Lawrence, 244 Quinton Rd. Birmingham 17, (Anglujo) en 6 ekzempleroj. La originalon oni ne ensendu. La konkursaĵojn bonvolu provizi per pseŭdonimo aŭ alia konigilo kaj skribu la saman pseŭdonimon sur koverton, kiu enhavas vian nomon kaj adreson. Krom tio bonvolu aldoni tri validajn internaciajn respondkuponojn.

La templimo de la ensendo estas la 15-a de majo, 1956.

La ordinara juĝa komisiono — por tiu sola branĉo — kompletigas sin per s-roj H. E. Jensen (Toustrup), Poul Thorsen, (Kopenhago) kaj E. Windeballe (Odense).

Ĉiu, kiu kapablas traduki el la dana lingvo, krom la komisionanoj, rajtas partopreni la menciitan konkurson. Por la danaj komisionanoj la ceteraj branĉoj de BK estas malfermitaj.

## Garantia Fondajo de UEA

Tiu fondajo, kune kun Montevidea Fondajo, donis al UEA la eblecon defendi la pozicion de Esperanto ĉe la Unesko-konferenco kaj la aranĝadon de la unua universala ekspozicio de Esperanto en Montevideo.

La Estraro nun decidis transporti la ekspozicion al Strasburgo por montri ĝin al la Eŭropa Konsilantaro, kaj por poste utiligi ĝin en aliaj lokoj. Por ne tro foruzi la Garantian Fondajon estas necese, ke bonvolaj esperantistoj kontri-

buu al la kresko de la Fondajo. Jam nun mi povas informi, ke alvenis donaco de 200 sved.kr. (proks. 14 anglaj pundoj) de anonima „Nogo“. Mi kore kvitancas tiun donacon kaj esperas ke multaj aliaj sekvos. Vian kontribuon vi povas sendi al UEA en Rotterdam aŭ al mia adreso en Stockholm.

Ernfrid Malmgren  
Prez. de UEA,  
Administranto de la  
Garantia Fondajo.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

## REDAKCIA INFORMO

